

Protokolo de la 63a SAT-Amikara kongreso, okazinta
en Antonio inter la 22a kaj la 25a de marto 2008.

kompilis Phil Guichet kaj Vinko Markovo

10-a de julio, 2008

Enhavo

1 Unua laborkunsido	5
1.1 Agadraporto	8
1.2 La SAGO	11
1.3 Rebatoservo	13
1.4 Perkorespondaj kursoj	13
2 Dua laborkunsido	15
2.1 Laborgrupo pri La SAGO	15
2.2 Laborgrupo pri la retejo	17
2.3 Laborgrupo- libroservo-eldonpolitiko	22
2.4 Laborgrupo pri lokaj grupoj	25
3 Tria laborkunsido	27
3.1 Lokaj grupoj	28
3.2 FEI	28
3.3 Kasraporto.	28
3.4 SAT-kongreso.	32
3.5 Estontaj kongresurboj.	32
3.6 La SAGO.	32
3.7 Retejo	33
3.8 Libroservo kaj eldonpolitiko.	33
3.9 Lokaj grupoj	34
3.10 Kursoj kaj pedagogio.	34
3.11 Service de Presse	35
4 Kvara laborkunsido	37
4.1 Privatigo de edukejoj	37
4.2 Rolo de edukejoj en batalo kontraŭ forpelo de enmigrantoj sen legitimiloj .	39
5 Dankoj	43

ENHAVO

ENHAVO

Ĉapitro 1

Unua laborkunsido

Julieto Ternant malfermas, vokante la salutantojn, kaj transdonas la parolvicon al Dominiko Simeone.

Dominiko Simeone:

Karaj gekamaradoj, karaj geamikoj, mi salutas vin kore de tiu 63-a kongreso de SAT-Amikaro en Antonio.

Nuntempe la mondo bezonas humanismajn kaj progresemajn celojn kaj ideojn. Iuj diras, ke nur la kapitalismo ekzistas kaj konsistigas nian estonton. Tamen ili forgesas militon, malriĉecon, malsaton. Tiu sistemo produktas multajn negativajn fenomenojn.

Feliĉe Esperanto havas gravan lokon kaj rolon en la tuta mondo. SAT-Amikaro celas agi, informi kaj instrui en franclingvio kiel LEA-o de SAT. Nia asocio kunvenas en Antonio, interalie, ĉar ni ne sukcesis kunveni en suda Francio.

Plie la asocio frontas grandajn defiojn. Novaj agemaj membroj partoprenas en niaj aktivaĵoj. En tiu senco, ni devas pensi pri nia organizado kaj nia estonto. La kongreso ebligas plenumi tiun celon.

Bedaŭrinde, kelkaj membroj malproksimiĝis de nia asocio. Tion ni bedaŭras. Tamen ni ne devas resti sen reago. Kiel fari? Ni devas agi kune, por ke nia asocio vivu preter la diversaj malfacilaĵoj, kaj por ke ni "fosu nian sulkon".

Karaj gekamaradoj, Lanti kaj aliaj progresemaĵoj esperantistoj kreis SAT-on en 1921. Post pluraj ruĝulaj kaj universalaj Kongresoj. Kontraŭ milito, por paco, por liberpensado, por libereco, por sennacieco. Ili luktis kaj agis dum jaroj ĝis nun. Ni, ene de SAT-Amikaro devas daŭrigi tiujn luktojn kaj agadon en diversaj kampoj. Ni devas ĉiam kaj kuraĝe flori la verdan stelon.

Norbert Barthelmess verkis kanton "Al la sennaciularo" en la jaroj 1920-aj:

Agemon vekas celkonscio,
Progresas mond per nia far,
La venkon de la Sennacio
Ja garantias SATANAR

ĈAPITRO 1. UNUA LABORKUNSIDO

Laŭ tiu kanto, mi esperas, ke tiu kongreso estos tiu de la daŭrigo de SAT kaj de SAT-Amikaro. Mi deziras al vi bonan kaj fruktodonan kongreson.

Veroniko Girard: La okk-anoj ege ĝojas akcepti vin kaj dankegas vin pro via ĉeesto, malgraŭ la malfacilaĵoj, kiujn vi kaj ni renkontis.

Gerardo Lieblang: Mi salutas vin nome de Sennacieca Asocio Tutmonda SAT - kaj de ties Plenum Komitato.

Aparte de la Prezidanto de la Plenum Komitato Jakvo Schram kiu bedaŭras ke li ne povas saluti vin persone.[Lia aŭto paneis. Li lasis al mi klarigan mesaĝon]

Kiel vi eble jam scias SAT estas laborista asocio, fondita en 1921, kiu arigas individue homojn el la tuta mondo, laboristoj kiuj celas alian evoluon de nia homaro, evoluon direkten al socioj plene respektemaj de la homecaj, progres-emaj valoroj, al vera civilizacio.

SAT donas al via asocio SAT-Amikaro kaj al la aliaj Laboristaj Esperanto-Asocioj ilian plenan sencon. Aliĝo al LEA estas preparo por aliĝo al SAT.

Kiel vi verŝajne scias SAT konis kaj daŭre konas krizon pro adaptiĝo al ĝia nuna situacio. En marto 2009, Kreŝo Barkoviĉ, ĝia ĝenerala sekretario emeritiĝos. Tio necesigos alian organizadon de la administrado kaj funkciado de la asocio.

Jam tamen oni povas konstati pozitivajn signojn pri la evoluo de la asocio.

Dankal malavareco de kamaradoj kiuj fariĝis dumvivaj membroj, la plej grava financa aspekto de la krizo estas superigita. Ili estu tukore dankataj.

Nova skipo eldonas renovigitan Sennaciulon, la revuo de SAT, kies aspekto kaj enhavo ricevis komplimentojn eĉ ekster niaj membroj.

Eldon kooperativo faras siajn unuajn paŝojn.

Nova agad- kaj varb-politiko, bazita sur la SAT-rondoj, stariĝas.

SAT ne plu estas nur Eŭropa asocio. Ĝi vigliĝas ankaŭ en Japanio kaj Koreio. Kaj ni eĉ volas partopreni la aventuron de la Iper spaco. Trideko da SAT anoj aliĝis al la reto Ipernity kaj tie interŝanĝas fotojn, tekstojn, eĉ filmetojn kaj muzikon en la tre vigla etoso kreita de alveno de 725 esperantistoj dum la naŭ monatoj kiuj sekvis la kreadon de esperanta interfacio. Evidente ni agas tiel ke ni ne perdu nian SAT identecon. Tia estas la celo de la nove kreita Iper rondo.

Jen la lastaj novaĵoj de asocio kiu sin sentas plene viva kaj kiu tre volonte akceptos tiuj el vi kiuj ankoraŭ ne aliĝis.

Ha, pardonu min, mi forgesis : SAT kongresos ĉi jare en Bulgario, pli precize en Kazanlak, la valo de la rozoj.. Prezento de tiu kongreso estas antaŭvidita en la programo de via kongreso.. Ĉu mi risku anonci ke verŝajne en 2009, la kongreso de SAT okazos en Milano?

Françoise Guillaumé: Karaj gekamaradoj kaj karaj geamikoj, mi salutas la gekongresanojn nome de la Nacia Federacio de la Libera penso. Nun ĝi kolokvas en Parizo pri 160 jaroj de Libera penso. Tiu internacia kolokvo substrekas gravajn herdaĵojn, kiu

ĈAPITRO 1. UNUA LABORKUNSIDO

entenas Esperanton ekde 1904. Ni deziras al vi fruktodonan kongreson.

La komisiono Esperanto de la Nacia Federacio de la Liberapenso.

Neniu salutis nome de UFE.

Huberto Peyrouy: salutas nome de la fervojistoj.

Guy Cavalier: nome de la skipo de Radio Esperanto, kiu elsendas ĉiuvendrede. Kaj dankas al Vinilkosmo pri la helpo. Radio aŭskultebla pere de la reto. Kontakti lin por ricevi informojn. Frekvenco 89.4 Mhz.

Huguette Ménard: nome de ICEM-Esperanto. Kun granda emocio eksciis de kelkaj tagoj pri la forpaso de Lentaigne, kiu kreis ICEM ĉirkaŭ 1960 kaj transdonis al ŝi kelkajn listetojn. Kreis sliparon de la abonantoj ĉar ŝia edzo Henri Ménard estis kasisto de tiu asocio por instruistoj el la mondo. De la emeritiĝo estis samtempe presisto de tiu gazeto kiu aperis 4 foje jare kaj estis sendita en 38 landoj. Post la morto de Henri Ménard, André Bourdet daŭrigas la laboron, neestante la kasisto. Malfacilaĵoj ĉar ambaŭ korespondas perkomputile kaj multaj personoj plendas pri eraroj en la abonantarolisto.

Dominiko Simeone: salutas nome de la direktoro de la restadejo kaj de Ghislain Maréchal.

Vito Markovo: salutas nome de SYM, kiu administras Kvinpetalon, bone ejo por praktikadi la lingvon kaj trapasi ekzamenojn de FEL.

Guy Cavalier: senkomisie salutas nome de la Pacista Unuiĝo de Francio. Multaj en Bruselo nun, por bloki la NATO-sidejon. Celo subteninda.

Bob Cordeau: salutas nome de ILO, la asocio en Kastelforto.

Juliette Ternant: legas skribajn salutojn de Andrea Montagner, nome de Arci Esperanto:

Karaj ge-amikoj kaj ge-kamaradoj,
okaze de la venonta Kongreso de SAT-Amikaro, mi volas sendi al vi ĉiuj la salutojn de Arci Esperanto kaj de ĝiaj membroj.

Kvankam Arci Esperanto ne estas ligita al SAT statute, certe multaj estas la komunaj valoroj kaj celoj, kiuj iel kunligas niajn asociojn.

Mi bondeziras sukceson al SAT-Amikara Kongreson, kiu povu porti novajn kaj freŝajn ideojn al niaj bataloj ne nur por esperanto sed per esperanto al bataloj de ĉiuj homoj por plibonigi la mondon.

Korajn salutojn
Andrea Montagner
Arci Esperanto

kaj de SLEA:

Karaj SAT-Amikaranoj!

Ni svedaj LEA-anoj volas transdoni niajn sincerajn salutojn al via kongreso en Antonio kaj deziras al vi fruktodonan renkontiĝon! Ni ĉiam havis vin kiel modelon por kiel LEA devus funkcii. Ni deziras al vi longan vivon en la servo de la tutmona laborista esperantismo. Ni svedaj LEA-anoj spertas la

ĉiutagan klasbatalon fare de la dekstrularo. Vi SAT-Amikaranoj estas la lumo en la mallumo. Daŭrigu pri tio!
Tutestime salutas!
La SLEA-estraro pere de Pelle Persson

Juliette Ternant: Transiro al la unua laborkunsido. La dua laborkunsido konsistos el laborgrupoj. Pri la temoj legeblas en la kongreslibro. Lasta laborkunsido morgaŭ matene. Dum ĝi raportos la laborgrupoj. Proponas kiel prezidantojn Marcelo Redoulez kaj Guy Martin. Voĉdonado: Vito Markovo, Teo Levi kaj Juliette Boyer. Prezidado transdonita al Marcelo Redoulez.

Marcelo Redoulez: petas indulgon, ĉar unuafaje transprenas la taskon. Konsentis tion fari omaĝe al sia esperanto-patro Leo Robert. Tagordo konsistas el agadraporto kaj mesaĝo de Henriko Masson al la kongreso. Poste raporto pri la libroservo. La SAGO. Informservo kaj rebatservo: neestos raporto ĉar la respondeculo demisiis. Kursoj. Lokaj grupoj. Libroservo. Referendumo.

1.1 Agadraporto

Juliette Ternant: Legas la agadraporton, kiu aperis en la januara SAGO, kaj konkludas petante aplaŭdojn al la libroservantoj. Kongresaj preparlaboroj estis tre pezaj ĉar lastatempa organizado.

Marcelo Redoulez: vokas al demandoj pri la raporto. Unue pri la agadoj de la jaro 2007. Due pri la demisio. Trie pri la estonteco.

Huberto Peyrouy: dezirus scii pli detale pri la demisio de Henriko.

Juliette Ternant: punkton post punkto.

Neniu demando pri 2007. Transiras al la dua punkto.

Sergo Sir: petas klarigojn pri la neaĉetado de la sidejo.

Bernardo Schneider: legas ekstrakton el la kvinpaĝa mesaĝo de Henriko.¹

Aplaŭdoj.

Aldonas, ke tio estas nur parto el pli ampleksa mesaĝo, ke li absoluta samopiniis kun Henriko kaj por la samaj kialoj demisias el la komitato.

Marcelo Redoulez: dankas pro la mesaĝo sed ne pro la demisio. Ankoraŭ neklara estas la demando pri neaĉeto de la lokalo, se la kondiĉoj ne estis pretaj por tio.

Bernardo Schneider: La komitato komisiis min fari la klopodojn ĉe la notario kaj la vendisto. La afero relative bone evoluis, kaj ni preskaŭ sukcesis akiri la magazeton. Por informi vin jen ekzemple raporto de kunveno de la komitato:

” per telefona informo oni ĵus ekscias ke André Sadier per propra iniciato telefonis al nia notario dirante ke SAT-Amikaro ne posedas sufiĉe da mono por la eventuala aĉeto de la apuda butiko. La ĉeestantaj komitatanoj bedaŭras tiun neatenditan intervenon de la kasisto, tiel ke ĉiuj klopodoj faritaj ĝis nun por scii ĉu estas ebleco aŭ ne akiri tiun lokalon riskas troviĝi bremistaj aŭ eble eĉ nuligitaj. Paroli al la notario pri la konflikto inter la komitatanoj ne estas la plej bona metodo por helpi la asocion. Fariĝas urĝa la akiro de

¹Ĝi estas konsultebla en la suplemento de la februara numero de La SAGO... ja postkongrese aperinta!

lokalo pro la libroservo de SAT-Amikaro. Ni devas faciligi la laboron al la juna skipo kiu pretas transpreni la taskon.

Post multaj klopodoj helpitaj de Veroniko Girard, kun la aprobo de Juliette kaj aliaj komitatanoj, subite eksciis ke Jean Selle rilatis kun la notario sen informi min. Jen kion li skribis en la letero al la notario *"Un membre de SAT-Amikaro - ne de la komitato! - s'est probablement informé à titre personnel auprès de votre office notarial notre mais aucune réponse écrite n'est parvenue au comité directeur de l'association seul habilité à prendre une décision d'achat d'un bien"*. Tio signifas, ke li torpedis min kaj tre damaĝis al akiro de la butikoj. Plie Andreo rifuzis disponigi la monon kiu estis sur la centra konto. Tial fiasko pri akiro ne nur utila sed absolute necesa.

Marc Noel: ĉu la tuta letero de Henriko Masson aperos en la venonta numero de la revuo?

Juliette Ternant: decidis ne legi la tutan leteron, ĉar tro longa, sed ĝi ja estas disponebla al la membraro.

Marcelo Redoulez: proponas afiŝadon de la teksto.

Sergo Sir: proponas aperigon kiel daŭrigon de "Service de Presse".

Akceptite kun aplaŭdo.

Izabela Martinez: petas kiu decido estis prenita de la estraro rilate al Andreo Sadier, pro lia netolerebla sinteno.

Jana Peyrouy: laboris kiel kasisto. Surprizita ke kasisto povas bloki se la asocio tion decidas.

Marcelo Redoulez: ankaŭ la prezidanto rifuzis.

Bernardo Schneider: nur la prezidanto rajtas subskribi interkonsenton kun la notario. Havis hejme pli ol dek kubaj metroj da materialo, nun en la sidejo. Kompatas Veronikon kaj Viton kiuj akceptis repreni la servon en tiuj cirkonstancoj. Plie estas luata garaĝo, kie estis ĉirkaŭ 12 kubaj metroj da materialo, interalie la PIV-stoko de SAT.

Sergo Sir: rimarkigis ke jam en Ĉamberio, ke estas tamen iom strange, ke komitato povas decidi pri gravega aĉeto sen informi la membrojn. Ja estis ĉi-foje informo en la Sago pri monhelpo bezonata, sed tamen estas strange, ke tia decido estas prenita tiel lastminute. Do se prezidanto iom hezitas, tio ŝajnas sufiĉe normala afero, ĉar tamen li leĝe respondecas pri tio. Ne subtenas la pozicion de Selle, sed komprenas ĝin.

Bernardo Schneider: la butikoj estis aĉetebla en tre favoraj kondiĉoj. Pri la unua sidejo, leviĝis samaj malfacilaĵoj. Celo estis ebligi grupigon de SAT-Amikaro kaj de SAT en la sama ejo, por helpi al SAT kiu laboris en tre malfacilaj kondiĉoj. Tiam jam opono de Selle kaj Sadier. Kaj nun ĉiuj entuziasmiĝas pri la nova sidejo. Nun eĉ la kontraŭantoj fieras.

Robin Beto: nek Selle nek Sadier ĉeestas. Ni aŭdis la argumentojn favoraj al la aprobo. Per kiuj argumentoj estis pravigita la rifuzo?

Juliette Ternant: la vendisto petis tro altan prezon por la antaŭpago. Anstataŭ la normalaj 10% li postulis 50%. Tiujn argumentojn donis la prezidanto kaj la kasisto, kiu tamen estis preteksto. Fine la vendisto akceptis malaltigi la vendoprezon. Sed rifuzo vendi ĉar opiniis la asocion neserioza. Kasisto kaj prezidanto opiniis, ke la asocio devas konservi sufiĉan monon, ĉar la sidejo kreas sufiĉe multajn elspezojn. Jam por la unua sidejo estis multaj problemoj pro nur du bremsantoj, sed en ŝlosilaj pozicioj. Sergio pravas, ke oni

devus averti la membrojn.

Sergo Sir: se la anaro estus informita, ĝi povus apogi.

Juliette Ternant: jes ja, sed malfacile doni la informojn nun, ĉar la rifuzantoj forestas.

Bernardo Schneider: klopodoj kun la vendisto preskaŭ amikaj. Reciproka fido inter li kaj Bernardo. Havis grandan esperon kiam Dominiko transprenis la prezidantecon. Tiam rilatis denove kun la vendisto, kaj tiu ĉi respondis, "ŝajnas al mi, ke via komitato mokas nin kaj mi trovis alian aĉetanton". Dominiko do prezidantiĝis kelkajn tagojn tro malfrue.

Robin Beto: apuda ĉambro luebla, ĉu? Rimarko: per lokaj grupoj kaj regionaj delegitoj tiajn informojn oni povus multe pli bone diskonigi.

Bernardo Schneider: ja luata. Aĉetanto estas investisto, kiu luigas la butikon 950 eŭrojn monate. Ankaŭ ĉambro ĉe la unua etaĝo kiu estus tre utila al la asocio.

Bernardo Schneider: ne rajtas heredi gravan sumon. Ricevo de altvalora donaco postulus repagon de 60%. Grupo da kamaradoj sin proponis por pruntedoni la mankantan sumon.

Marcelo Redoulez: atingis punkton, kie informoj pri la neaĉeto estis donitaj. Finite pri la pasinteco. Nun ĉu la nomo de Andreo Sadier plu estas en la listo. Ĉu iu alia transprenus la rolo?

Juliette Ternant: inter la restantaj maljunuloj en la komitato ja estas Andreo.

Marcelo Redoulez: kio pri la librostoko?

Bernardo Schneider: la komitato elturniĝos, devos aĉeti plian sidejon. Kontoj de la libroservo kontrolitaj de Veroniko, Vito, Jakvo Fichou, kaj Phil Guichet. Plua projekto pri "Kiel traduki?", sed Andrio prokrastigas la aferon por havi pli da materialo. Ankaŭ nova metodo verkita laŭ la metodo de **la Leciono** de Ionesko. La komitato akceptis eldoni. Povos respondi **Frederiko Scibor**. Katalogo aperis nur kelkajn tagojn antaŭ la kongreso. Oficiale aperos en la venonta SAGO. Malfruo.

Vinko Markovo: Mi rimarkigos, ke tiu malfruigo en la aperigo de la katalogo estas simple unu plia elmontrado de la fakto, ke kelkaj aferoj ne glate funkciis, ni ĉiuj havis amasegon da taskoj, kaj, laŭ mia kompreno, la katalogo estis pretigita fine de januaro, kaj kontrolita de Bernardo, Veroniko kaj Vito. Ili sendis mesaĝon al Frederiko por diri "sendu al la presejo", Frederiko mistrafis la mesaĝon, ili mem ne rekontrolis, kaj ne petis tuj, ĉu li sendis al la presisto, kaj la aliaj estis okupitaj de la preparo de la kongreso, neniuj petis tuj rekontroli, ĉu la materialo estas ĉe la presisto; kaj finfine kiam mi petis de Frederiko, ĉu li sendis, tiam li sendis al mi kaj mi tuj sendis al la presisto. Sed tio jam estis ĉirkaŭ la 20-a de februaro. Pasinstsemajne mi demandis al la presisto, ke li eldonu la katalogon, eĉ se februara Sago ankoraŭ ne aperis, kaj pro tio ĝi aperas nur nun. Estas entute sinsekvo da fuŝetoj, kiuj fontas en pluraj aferoj, kiuj estas, ke, pro la demisio de Henriko estis problemo rilate kun la presisto, ne ĉiuj sciis precize kun kio estas mandatita. Estas do ĝenerala problemo de organizado, kaj supersŭtiteco de ĉiuj, kiu faras ke ne ĉiuj kontrolis sufiĉe akurate sian parton de la laboro.

Bernardo Schneider: prezentas siajn anstataŭantojn, kaj petas aplaŭdojn al Veroniko kaj Vito.

Robin Beto: aŭdinte la etoson reganta en la komitato, ŝatus ekscii kiaj estas la rilatoj

kun Veroniko kaj Vito.

Bernardo Schneider: ĝis nun tre bonaj, eĉ amikaj.

Marcelo Redoulez: esperas, ke la transiro glate okazos.

Jana Peyrouy: petas aplaŭdon al Bernardo.

1.2 La SAGO

raportas **Vinko Markovo:** La ĉefa blokiga punkto estis la enpaĝigisto, Cyrille Decouture, pri kiu ni ne vere sciis, ĉu li emas daŭrigi la laboron aŭ ne, kaj ĉar la komitato havis pli gravajn punktojn por trakti, ol doni al ni klaran mandaton, por scii kiu enpaĝigu, la afero ŝvebis iom en la aero, kaj ŝvebis iom tro longe, kaj pro tio estis tiuj malfrue. Sed finfine li klare anoncis, ke la februara numero, pri kiu li nun sendis la provaĵojn, estos la lasta, kiun li enpaĝigos. Ekde la venonta numero Serge Sire zorgos mem pri la enpaĝigo, kaj tio signifas, ke estos verŝajne iom da malfruo ankoraŭ dum kelka tempo, sed ni devus rekapti sufiĉe rapide normalan ritmon. Mi tamen deziras atentigi, ankaŭ ke dua kondiĉo por havi relativan akuratan ritmon, estas ricevo de sufiĉe grava kvanto da kunlaboraĵoj, kaj sufiĉa vigleco de la legantoj. Se la redakta skipo devas kromredakti ankaŭ inventi ĉiujn artikolojn, tio estas pli ol nura redaktado, kaj tio estus iom artefarita afero ankaŭ, ĉar ni ne estas ĉi tie por artefarite kredigi, ke SATamikaro vivas, sed por raporti, kio ekzistas reale. Do ankaŭ estos necese diskuti ĉi posttagmeze, kiamaniere oni povas iom plivivigli la Sago-skipon, kapti pliajn kunlaborantojn, eĉ se nur popunkte.

Marcelo Redoulez: petas aplaŭdojn al la tuta skipo. Rilate prokraston, demandas ĉu tio naskas problemojn?

Juliette Ternant T: multaj telefonvokoj en la sidejo. Multaj demandoj. Eĉ la nacia biblioteko skribe petis informojn. Estas timinde, ke kelkaj ne pagos la kotizon. Ankaŭ problemoj pri prokrastigo de kelkaj informoj. Ekzemple neaperis raporto pri la perkorespondaj kursoj.

Bernardo Schneider: samopinias kiel Julieto. Revuo nura ligilo inter la komitato kaj la membroj. Membroj el provico ne havas aliajn rilatojn kun la komitato.

Marcelo Redoulez: redemandis pri prokrasto de kelkaj semajnoj. Ĉu ili kredas sin klientoj?

Sergo Sir: ĉu preferindas akurateco aŭ bonkvaliteco. Ĉu akurate ĉu bonkvalite?

Bernardo Schneider: preferas regulecon kaj riĉecon.

Sergo Sir: tiam sendu artikolojn. Esperantistoj aktivigas ĝenerale estas plej malfacile plenegebla.

Hugette Ménard: eble estas plifacile fari grandan dumonatan numeron.

Marcelo Redoulez: persona sento estas, ke la revuo estas fenestro. Ĝi devas esti altkvalita.

Bernardo Schneider: dumonateco estus regreso.

Guy Martin: kiom da ekzempleroj eldonitaj. Nura ligo inter la SAT-Amikoj. Ankaŭ aliaj abonantoj ol la SAT-amikaranoj?

Guy Cavalier: 1100 senditaj. 10 numeroj en la jaro.

Bernardo Schneider: 500 kromekzempleroj pri la katalogo. 1700 ekzempleroj.

Sergo Sir: laŭbezzone aperigi malpli da paĝoj. 8-paĝa numero aperigebla.

Bernardo Schneider: dank'al la francaj paĝoj, legata ne nur de esperantistoj. Informoj petataj de membroj. Ĉu service de presse daŭre aperos?

Marcelo Redoulez: ĉu Henriko ne plu produktos la SP?

Juliette Ternant: klare diris: ne "SP".

Huguette Ménard: se la SAGO estas konsiderata kiel SP, oni ne rajtas ŝanĝi la datojn. Se oni transportas al la poŝtoŭicejo post la limdatoj, administraj problemoj kaj risiko pri perdo de la prestarifo.

Guy Cavalier: Pri la **Service de Presse**, Henriko daŭrigas sendepende la laboron, kaj eblos ĉerpi ankaŭ el aliaj fontoj.

Henriko Graven: proponas ke la letero de Henriko konsistigu multajn epizodojn.

Juliette Ternant: pri la SP, Henriko tute klare diris, ke Henriko plu faros ĝin. SP estas suplemento de la asocia revuo. Teksto en la franca lingvo.

Robin Beto: ne tre klare, kia estas la diferenco inter gazetservo kaj SP.

Bernardo Schneider: ofte vanaj debatoj pri la apero ĉu en Eo ĉu dulingve. Tiu solvo kontentigas ĉiujn partojn.

Robin Beto: repetas la diferencon inter SP kaj informservo.

Bernardo Schneider: ĝis nun Henriko prizorgis ambaŭ. SP ambaŭ rebat- kaj informservo.

Marcelo Redoulez: informservo redaktado de la raporto.

Sergo Sir: SP stranga titolo, ĉar nur unu kolumno estis "ça bouge partout". La cetero estis artikoloj pri la ideoj de Henriko. Povas esti eblecoj aperigi dulingvajn aferojn. Havi franclingvajn paĝojn estas eble.

Marcelo Redoulez: misio por la redaktoskipo aldoni 4 paĝojn. Informservo vakas. Kiu prizorgos ĝin?

Vinko Markovo: Pri tiu problemo de vakanta informoservo kaj tiel plu, mi tamen deziras rimarkigi, ke de kvar jaroj, estis starigita en SAT, poresperanta fako, ĝuste kun la celo diskuti kaj redakti materialon por informi nacilingve pri Esperanto en laborista medio, kaj do eĉ se la ĝisnunaj rezultoj de tiu fako estas relative modestaj, ĝi tamen ekzistas, do estas jam grupo da homoj, kiuj, ne nur en Francio, sed ankaŭ alilande, cerbumas pri la demando, redaktas tekstojn, ekzemple niaj kamaradoj el Hispanio estas tre aktivaj tiurilate, en ilia retejo estas multaj tekstoj pri Esperanto en la hispana, kaj Esperanta versio ekzistas, do ĝi estas sufiĉe facile tradukebla en la franca. Do mi estas relative optimisma pri la materialo. Sed kio estas grava laŭ mi, estas klare difini kiuj estas la celo de tiu informado, kaj ĉefe kiaj estas la kamaradoj, kiuj surpronos tiun taskon. Ĉar evidente tio ne povos esti la laboro de nur unu persono, kaj tion oni devas organizi... Do nun por esti iom pli preciza, kaj ne fortimigi vin, unu el la tre simplaj aferoj fareblaj, estas simple havi kelkajn kamaradojn, kiuj akceptas traduki, kiam oni donas al ili tekstojn el Esperanto al la franca. Estas amaso da uzeblaj tekstoj nun, redaktitaj de diversaj SAT-kamaradoj, kiuj estus uzeblaj, kiel anstataŭon de la artikoloj de Henriko, nur mankas homfortoj por ilin traduki france.

Henriko Graven: kial SAT-amikoj ne povas verki artikolojn?

Ansofi Markov: se temas pri tradukoj, povas esti ĉiutaga laboro de grupoj. Parto farebla kadre de la kursoj.

Phil Guichet: ankaŭ pretas traduki.

Robin Beto: same.

Juliette Ternant: en la referendumo iuj anoncis sin ankaŭ.

Petro Levi: ĉu oni rajtas fari la laboron ne farinte la promeson?

Marc Noel: pretas traduki el la germana lingvo.

1.3 Rebatoservo

Marcelo Redoulez: sama problemo, forestas raportanto. Tiu servo ne plu ekzistas.

Robin Beto; esprimas bedaŭron, ken Henriko ne sendis raporteton.

Vinko Markovo: Mi ne estas mandatita de Henriko por raporti la aferon, sed tamen ĉar mi iom klopodas sekvi la aktualaĵojn en la reto, mi tamen povas diri, ke Henriko lastatempe dediĉis multe da energio por rebati, ekzemple, en iu forumo, kiu nomiĝas Agoravox, kiu estas malfermita al ĉiuj. Kaj tio levas gravan demandon, interalie pri la kampo sur kiu oni rebatas. En la reto estas homoj, kies ĉefa tempopasiĝilo estas provoki. Henriko elspezis multege da tempo por rebati al la krenaĵoj de unu aŭ du el tiuj unuopuloj, kaj li tute ne komprenis, kial aliaj ne emas ankaŭ enmiksiĝi en tiuj polemikoj, kiuj alportas nenion. Oni devas konscii, ke tiaj aferoj ekzistas, kaj oni devas precize difini la limojn de la kampo, kie rebati. Ni vidas kelkajn aferojn, pri kiuj oni povos iom organiziĝi. Estas unue kolekti kaj iom centraligi la artikolojn, kie estas misprezentita Esperanto, kaj tutsimple listigi la lokojn, kie aperas tiuj fuŝaĵoj, kaj due listigi la argumentojn proponitajn, kaj prepari slipon de rebatoj pri diversaj punktoj. Ekzemple ofte alvenas la argumento, ke Esperanto neniam estas lernita de simplaj laboristoj. Por rebati al tio, sufiĉas havi en la franca jam pretaj intervjuoj de kelkaj kamaradoj, kiuj estas manlaboristoj aŭ intelektaj laboristoj, oni povas intervjui kamaradojn por pruvi, ke tio estas falsa. Kaj por multaj aliaj aferoj, sufiĉas havi la liston de faktoj. Kaj tio estas ankaŭ unu el la celoj de la retejo. Eĉ se estas sento pri granda paniko, pro la fakto, ke Henriko forlasas, ni devas tamen konscii, ke multaj aferoj estas relative facile solveblaj pere de iom da organizado kaj la restrukturado de la laboro.

1.4 Perkorespondaj kursoj

Juliette Ternant: legas raporton de Marcelo Redon. Publikigota en la SAGO.

Sergo Sir: estos en la venonta. Ne ricevita ĝis nun de la skipo. Oficiala korespondanto estas Sir.

Bernardo Schneider: punkto tute forgesita: rilatoj kun Afriko. De post 10 jaroj, Jean-Yves Santerre zorgas pri tio. Sendo de materialo. De pli ol 30 jaroj SAT-Amikaro sendas materialon al Afriko. Tre utila laboro.

Veroniko Girard: 47 kilogramoj da libroj (t.e. 164 libroj) estis ekspeditaj. La libroj estis senditaj al : Alĝerio, Maroko, Benino, Senegal, Respubliko Kongo, Kongo Kinŝasa, Kongo Brazavila. Ni kore dankas la "Centre Culturel Saint-Nazaire Esperanto-SAT" kiu donacis iom pli ol dudek librojn por la Afrikanoj.

Marcelo Redoulez: petas aplaŭdojn al Henriko, Bernardo kaj Julieto.

Ĉapitro 2

Dua laborkunsido

Ĝi konsistis el ses laborgrupoj, okazantaj paralele en tri salonoj dum unu horo kaj duono. La unua serio estis: "La SAGO", "Retejo" kaj "Libroservo". La dua serio estis "Lokaj grupoj", "Pedagogio" kaj "Service de Presse". Pri ĉi tiu lasta ne estas raporto, ĉar la kunveno ne vere okazis, pro manko de partoprenantoj. Pri la grupo "Pedagogio", la malbona kvalito de la registraĵo kaj la konfuzeco de la pritraktitaĵoj igis la kunvenon malfacile protokolebla. Se iu emas tion prizorgi, eblas disponigi la bezonatan materialon al la interesato.

2.1 Laborgrupo pri La SAGO

Ĉeestis: Daniel Lachassagne, Franjo Leveque, Marc Noulin, Robin Beto, Jean-Pierre Patrice, Claudine Pomirol, Marcelo Redoulez, Hélène Menissier, Ĵak LePŭil, Sergo Sir, Maksimiliano Gverino, Izabelo Jacob.

Marcelo Redoulez: petas rememorigi el kio konsistas la redaktoskipo.

Sergo Sir: oficiale Vinko ĉefredaktoro, Sergo korespondanto. Tute neŭtrala tasko. Ricevas ĉion rilata al la gazeto. Metas la ricevitaĵojn sub reta formo kaj transdonas al la skipo. Oficiale la skipo konsistas nur el korektantoj. Ne oficiala decida skipo. Ni ne sukcesis tion starigi. La nuna skipo tamen iom interkonsente funkcias ankaŭ kiel decida teamo. Pri la homoj, diversnivele implikitaj. Tre efike rolas Andreo Andrio kiel lingva kontrolanto, ankaŭ Vinko kaj siatempe sufiĉe efike Henriko, efike sed neregule Ge-Dumoulin, pli diskrete Veroniko. Antaŭe ankaŭ estis Rolando, Raneto kaj Marielo Giraud, kiuj foriris. Ĵak Lepŭil aldoniĝis antaŭ nelonge. Unu el la plej efikaj laŭ teama funkciado. Vinko ne ĉefumas. Konflikto kun Henriko funkciis parte el tio. Legokomitato kun nur Henriko kaj Sergo en la tempo de Djemil Kessous. Ĝis nun sukcesis trovi mezan kompromison por ke ĉiu funkciu senĝene. Iom strange, la komitato malkovras la revuon samtempe kiel la legantoj, male al Sennaciulo ekzemple. Masson ne komunikis al la komitato. Solvinda manko.

Robin Beto: kiel konkrete vi organiziĝas?

Sergo Sir: ĝis nun iom komplike, sed ĉar de nun Sergo zorgos pri la afero, tio multe simpligon la funkciadon, kvankam la kvalito estas malpli profesieca. Ricevitaj tekstoj senditaj x-forme por adaptiĝi al la apartaj sistemoj. Ĉiuj rajtas kaj devas resendi al

ĉiuj korektante aŭ farante rimarkojn. Nun Sergo ricevas la rezulton de ĉiuj ŝanĝoj kaj metas ilin en grandan slipon, kiun li sendas al Cirilo, kiu ne partoprenis la korektadon. Cirilo havas nur la taskon enpaĝigi. Nun estos pli simple ĉar povos enmeti tuj en la enpaĝigad-sistemo. Efektive teama laboro. Oftaj diskutoj lingvaj kaj ideoj.

Franjo Lévêque: kiu Cirilo?

Sergo Sir: Decouture. Tre diskreta homo. Tre efika, sed nun havas aĝo-rilataj problemoj. Spertis primokojn en la laborejo pro hejma laboro.

Vinko Markovo: ĝuste tio estis unu el la fontoj de hezitoj.

Sergo Sir: kvankam mi transprenas la taskon, ni nepre serĉu alian enpaĝigiston por havi sekuradon. Prefere estu du zorgantoj. Tiel ne estus tiu malfruo.

Robin Beto: ĉeestis lastjara tian kunsidon. Proponis sin por korekti fojfoje tekstojn, kaj nenion ricevis. Kion estigi lastjara kunsido.

Vinko Markovo: problemo pri neceso rapide reagi, tial ne sendis. Sed tekstoj de Luis Gohin uzeblaj tiamaniere.

Franjo Lévêque: nur kelkaj minutoj da reto tage.

Marcelo Redoulez: pri la enhavo.

Sergo Sir: honeste parolante, la malfruo de Cirilo estis sufiĉe oportuna, ĉar sen ĝi ni havus malfacilaĵojn por plenigi la numeron. Ne havus materialon por plenigi la malfruan materialon. Nepre necesas instigi SAT-Amikojn sendi tekstojn. Alkutimigi la homojn iom verki, kaj poste oni povos strebi al levo de la nivelo. Provo raporti spertojn. Tamen ĉio estas bonvena. Ĉio en formo ekspluatebla estis uzita.

Izabelo Jacob: preferinde rete, ĉu?

Sergo Sir: eĉ bone tajpitaj tekstoj uzeblas per optika karakterrekono-sistemo.

Maksimiliano Gverino: eble ludoj enmetindaj.

Sergo Sir: jam tio ekzistis (estu sagacaj). La loko estas preta.

Marcelo Redoulez: iuj ludantoj ne sendas la solvon.

Maksimiliano Gverino: alia propono. Guy diris, ke SAT-Amikaro havas multajn malnovajn numerojn. Eble enmeti anoncojn por aĉeti malnovajn numerojn.

Marcelo Redoulez: kopiu la anoncon el LKK.

Vinko Markovo: demandas, kiaj rezultoj estis atingitaj pri varbado per la SAGO.

Maksimiliano Gverino: neinteresa por neesperantistoj, ĉar nemultaj francaĵoj. En la UFE-gazeto estas multaj dulingvaĵoj. Preferas varbi per libroj kaj aliaj materialoj.

Ĵak Lepŭil: prezentas ĉiujn prezentablajn gazetojn. Neesperantistoj vidas kaj elektas. Respondas al la demandoj de la publiko.

Marc Noulin: La SAGO ne estas disdonebla por ekstera publiko.

Marcelo Redoulez: la SAGO estas prezentenda kaj -inda en budoj. Povas atesti pri vivo de Esperanto. Grava por montri ke Eo vivas. Disdonenda antaŭ la lernantoj.

Robin Beto; regule uzas la SAGON sur lokaj budoj, sed elektas laŭ la temoj. Ĉefartikolo pri Elizeo Rekluzo metita. Sed kiam temas pri esperantistaj aktualaĵoj, ne ĉar tio ne vere allogas eksterulojn.

Sergo Sir: en Kvinpetalo, du lernantinoj el iu lernejo en Puatiero elektis la temon Esperanto por fari memuaron. Intervjuis homojn kaj petis dokumentojn. Elektis la SAGON inter multaj aliaj, sed ne Le Monde de l'Esperanto. Ankaŭ pro la desegnoj.

Vinko Markovo: ĉu vi vidas diferencojn kun **Sennaciulo**? Ĉu ekzemple la artikoloj de Johano Sel' ne pli bone lokiĝus tie? Ĉu indus pli direkti la enhavon al lernantoj?

Maksimiliano Gverino: dulingveco necesa.

Vinko Markovo: ĉu la SAGO estas uzinda ankaŭ por strategiaj diskutoj?

Marcelo Redoulez, Franjo Leveque: ĉiuj strategioj uzindaj.

Sergo Sir: tamen kontraŭdiroj inter ambaŭ celoj. Tamen sentas sin malkomforte en largskala varbado. Preferas la kvaliton ol la kvanton.

Marc Noulin: ĉu en la amaso, estas kelkaj varbotoj pretaj labori por SAT? Delonge debatoj, do ni devas rezigni komplete. Pensu pri majo 1968. Kian rolon ludis Eo? Nenian. Nek antaŭe nek poste. Tamen la socio ŝanĝiĝis. Revolucio nebla nur dank'al Esperanto.

Sergo Sir: ne komprenas la rilaton kun la celo varbi homojn pere de la SAGO? Kium publikon ni celas?

Marc Noulin: nia celo estas neatingebla. Delonge oni parolas pri varbado al sindikatoj, kiuj tute fajfas pri esperanto.

Sergo Sir: ĉu ni do iru varbi ĉe Lepenistoj?

Ĵak Lepŭil: la SAGO estas organo de SAT-amikaro por la membroj de SAT-Amikaro. Ĉiuj faras tion, kion ili povas. Sed tio tute ne rilatas al la SAGO. Jam ekzistas gazeto por komencantoj. Ĉu reklami pri tiu ĉi gazeto? Al multaj fluaj parolantoj, kial prezenti facilajn artikolojn? Paĝo por komencantoj ekzistis antaŭ 30 jaroj. Normalaj membroj emas legi normalajn artikolojn.

Marcelo Redoulez: kiu konsentas reagi?

Franjo Lévêque: komencantoj ankaŭ flegindaj.

Ĵak Lepŭil: jes, sed ne nur.

Maksimiliano Gverino: oni eble devus havi unu artikolon en la franca pri la vivo de la asocio.

Sergo Sir: neceso klare decidi pri la celo: ĉu interna organo aŭ porekster gazeto. Tre malfacile havi ambaŭ ecojn en la sama numero. Alia problemo: kiu provizos la revuon per taŭgaj artikoloj? Ĝis nun la gazeto estas nur kunmetaĵo de ricevitaĵoj. Artikoloj de Selle estas bonaj truŝtopiloj. La artikolonombro ebligus elektojn.

Sergo Sir: por partopreni la teamon, donu vian adreson. Sporada partopreno eblas per nerespondo al la mesaĝolavango.

Maksimiliano Gverino: en kiu formato sendi la krucvortojn?

Sergo Sir: word aŭ openoffice.

2.2 Laborgrupo pri la retejo

Frederiko Scibor: La retejo de SAT-Amikaro ekzistas jam de pluraj jaroj. Unue estis Henriko Masson, kiu kreis la unuan retejon, post kelkaj jaroj, mi aliĝis al SAT-Amikaro, kaj post du jaroj, mi refaris la retejon per la programaro SPIP. Mi reprenis la malnovajn dokumentojn de Henriko Masson, kaj mi metis ilin en novan retejon kun la helpo de SPIP, sed mi ne ŝanĝis la strukturon de la retejo. Tio estas ege amatora maniero labori, oni aldonas informojn pli malpli en amaso. Kaj ankaŭ la strukturo mem ne kongruas kun la funkciado de la asocio kaj kun la Sago, ktp.

Mi akceptas labori pri la teknikaj punktoj, zorgi la aferon, sed mi ne povas sola skribi la tekstojn, pripensi la aferon, kiel ni devas restrukturi la retejon, ktp. En la retejo, ni havas pli malpli 500 vizitantoj tage, por Esperanto, por SAT-Amikaro. Hodiaŭ la retejo de la asocio estas ege grava afero por la venontaj jaroj de la asocio. Ni eldonas 1000 ekzemplerojn de la Sago, ni havas 1000 vizitantojn en du tagoj de la reto. Do laŭ mi ni devas uzi tempon ne nur por la Sago, sed ankaŭ por la retejo. La ideo de tiu kunveno estas vidi kiel ni povas strukturi la rubrikojn, kion ni devas enmeti en la unua paĝo, kion ni devas forĵeti. Ekzemple ni havas rubrikon "actualités" aŭ novaĵoj, neniam ni publikas ion en tiu rubriko. Ni havas alian rubrikon, kiu nomiĝas "initiatives", en kiu ni havas nur ege malnovajn informojn. Ĉu ni forlasas tiun rubrikon. Ni ankaŭ povas krei novan rubrikon, ekzemple, kiu estas "arĥivoj", en kiu ni metas la amason.

La celo de tiu kunveno ankaŭ estas trovi kamaradojn, kiuj bonvolas labori dum unu jaro por solvi tiujn problemojn. Ni povas proponi plurajn aferojn. La unua afero por la retejo estas la strukturo de la rubrikoj. La dua punkto estas la unua paĝo, poste ke (??) ni pripensis la strukturon, ni povas diri: "tiu parto, ni bezonas, ke ĝi aperas en la unua paĝo". Do la strukturo, la unua paĝo, la aspekto, kaj ankaŭ la servoj. Ekzemple, pri la servoj, mi deziras, ke ni parolu pri informletero. (07.57) Kaj ankaŭ la retbutiko. La celo estas simpla, ĝis nun en Francio, neniuj asocio proponas tiun servon, aĉeti Esperantajn librojn kaj vortarojn per la reto, simple kun kreditkarto. Mi scias ke SATamikaro havis sukceson pasintjare dank'al la libroservo, ĉar Bernardo Schneider zorgis la aferon kaj ege bone laboris, tiel estas la plej granda libroservo, ktp. Nun neniuj proponas retbutikon, do laŭ mi se ni deziras konservi tiun avantaĝon, ni devas estis la unuaj, kiuj proponas tion. Imagu, iu neesperantisto vizitas nia retejon, se li ŝatas Esperanton, li havas du demandojn: ĉu mi havas asocion proksime de kie mi loĝas, kaj ĉu mi povas aĉeti vortaron, libron, ktp. Estas la du unuaj demandoj, laŭ mi. Iu kiu havas ideon, ni devas tuj respondi al la deziro. Se li, poste, dum du monatoj ne plu aŭ das pri Esperanto, li forlasas la aferon.

Bob Cordeau: Estas problemo por la persono, kiu ne konas grupojn: "kie trovi grupon?", do la retejo devas zorgi pri la adreso kaj la ligiloj pri Esperanto.

Frederiko Scibor: Ni devas labori pri kion ni faras, kaj poste ni devas labori por ke la retejo estu ĝisdatigita. Ekzemple mi tute konsentas pri la adresaro de la asocioj, sed iu, de tempo al tempo, devas telefoni al la loka asocio por scii, ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas, ĉar foje oni trovas adreson, sed la asocio ne plu ekzistas, sed oni ne diras al la urbestro, ke la asocio ne plu ekzistas, ĉar ĝi ankoraŭ havas parton de salono kun ŝranko. Do la asocio ne plu ekzistas sed ekzistas Esperantistoj, kiuj tamen donas kursojn, do la afero kelkfoje estas ege malfacila. Sen asocio vi povas havi kursojn, kaj kun asocio vi povas ne havi kursojn. Se ni deziras aldoni en la retejo adresaron, ni devas labori, komprenu, ke tio funkcias kun la lokalaj delegitoj. Se ni havas 22 en Francio, 2 en Belgio, 1 aŭ 2 en Svislando, ni povas sufiĉe rapide kontroli ĉu la grupoj, la kursoj, la asocioj plu ekzistas. Sufiĉas demando al la delegitoj, aŭ demandi al ili mem ĝisdatatigi la retejon. Ni pripensis havi, en la retejo, la liston de la delegitoj kun telefono. Kaj ankaŭ ekzemple por ĵurnalisto de lokala gazeto. Pri la strukturo, ĉu ni povas krei arĥivon, por enmeti la malnovaĵojn? Kaj poste, kiel ni ordigos la arĥivojn?

Phil Guichet: Devas esti ĉu laŭ la temo, ĉu laŭ la dato, en la reto ni povas uzi ambaŭ.

Frederiko Scibor: ni povas proponi du listojn.

Bob Cordeau: ĉu uzi serĉmotoron?

Frederiko Scibor: tio ne ĉiam bone funkcias, ĉefe por trovi precizan artikolon.

Phil Guichet: ofte la serĉanto

Frederiko: ofte trovas interesan paĝon, ne notas ĝin kaj ne facile retrovas. La motoro de la retejo ne estas tre efika. Por trovi kongreson, ekzemple en la retejo de SAT, ni kreis rubrikon kun ĉiuj kongresoj. Kial ne por SAT-Amikaro? Laŭ mia scio tio ne ekzistas en la SAT-Amikara retejo, bedaŭrinde. Kial ne aldoni la protokolojn, kelkajn fotojn, ktp.

Phil Guichet: Tiuj informoj ne jam estas en la reto, ni devas retajpi la tutan aferon el la revuo.

Frederiko Scibor: Ni devas ĉion fari. Sed ni jam povas sufiĉe facile aldoni Antonian kongreson, kaj poste ni povas telefoni al Joël Lajus por scii ĉu li havas informon pri Bordoza, ktp.

Phil Guichet: almenaŭ la protokolon oni devas havi.

Guy Martin: Eblus aldoni konsilojn por organizi la venontan kongreson

Bob Cordeau: ekzemple havas informojn pri organizado de la venonta kongreson, sed ne povis sendi, ĉar la OKK-anoj de la venonta SAT-kongreso malfacile uzas la reton.

Frederiko Scibor: Ni povas krei privatan spacon por laboraj informoj, por varbiloj, ktp. Se iu asocio skribis varbilojn, ĝi povas enmeti kiel "document word" aŭ aliaj, por ke iu alia povu uzi la saman, ŝanĝante nur la nomon de la asocio...

Alia ideo: ni havas tri specojn de vizitantoj.

Unue, la SAT-Amikaranoj, aŭ ĝenerale la Esperantistoj, kaj en tiu speco, ni havas SAT-amikaranojn, kiu ekzemple deziras retrobi "service de presse" 2003, ni povas havi Esperantistojn de aliaj landoj kiu deziras scii kiel vojaĝi, aŭ trovi informojn por prepari ekspozicion.

Alia vizitantospeco estas la homo, kiu deziras scii kio estas Esperanto. Do ne Esperantistoj, scivolemuloj.

La tria speco laŭ mi estas la hazardemuloj, kiu ne scias, ke li alvenis en Esperanta retejo, sed kiu tamen estas ĉi tie. Kaj laŭ mi ni devas pripensi la aferon: ĉu nia retejo taŭgas por ĉiu speco. Laŭ mi ni nur havas problemon de strukturo, sed pli malpli ĝi taŭgas por la Esperantistoj, kiuj povas trovi sufiĉe de informoj pri diversaj aferoj. Poste por la scivolemuloj, mi pensas, ke nia retejo tute ne taŭgas.

Laŭ mi, unue la strukturo mem ne estas klara. Unue la nomo de la asocio estas SAT-Amikaro, por iu, kiu ne scias, kio estas Esperanto, tio estas tute ne klara. Ekzemple por iu, kiu alvenas en la retejo "Esperanto-France", tio estas tute klara.

Poste, laŭ mi ni havas tro da rubrikoj. Ni devas ordigi kaj malpli nombrigi la unuanelajn rubrikojn. Kaj ni ne havas, en la unua paĝo, rubrikon "FAQ" (foire aux questions = oftaj demandoj), kun ekz. "Qu'est-ce que l'Espeéanto?", "Kio estas Esperanto?", "Kio

estas SAT-Amikaro?”, ktp. Imagu iun studenton deksezjara, kiu devas fari prezentadon pri Esperanto en sia liceo. Ĉu en nia retejo, li sufiĉe rapide povos trovi ĉiujn informojn? Iu kreis en la unua paĝo rubrikon ”Qu’est-ce que l’Esperanto ?” kaj ”Pourquoi existe-t-il un mouvement des travailleurs Esperantistes ?”, en la franca. Sed tio estas ege longa teksto. Ni devas doni kelkajn informojn, kaj samtempe proponi duan paĝon por havi aliajn informojn. Do ĉu ni povas trovi kamaradojn por skribi, redakti, verki tiujn tekstojn. Ekz. ni proponas ses mallongajn tekstojn, aperas nur la titoloj ”qu’est-ce que l’Esperanto”, ”qu’est-ce que SAT-amikaro”, ”petite histoire de l’Esperanto”, ”l’Esperanto s’est formé comment”, ”Zamenhof”, ”la grammaire”, ”l’Espéranto aujourd’hui”.

Guy Martin: Ĉu historio de SAT-Amikaro, ĉar estas la retejo de SAT-Amikaro?

Phil Guichet: eble iom tro faka, ĉu ne?

Frederiko Scibor: Mallonga teksto, pli malpli 1500 aŭ 2000 karakteroj (pli malpli plenplena paĝo). En tiuj artikoloj ni devas, aŭ fine de la artikolo proponi aliajn artikolojn, ekz. pri historio estas mallonga historio de Esperanto ĝenerale, kaj ankaŭ ni povas proponi ”Petite histoire de SAT-Amikaro”, aŭ rekte se oni alklakas la vorton ”SAT-Amikaro”. Se ni deziras fari tion, ni devas scii, kiu povas redakti la ses artikolojn. Kaj poste ni bezonas kamaradojn, kiuj relegos la verkon. Ni bezonas 6 kamaradojn, kiuj skribas la tekstojn, kaj poste, kiam iu skribis tekston, li sendas al aliaj, kaj la aliaj faras rimarkojn pri lia teksto.

Guy Martin: Pri la retejo, mi opinias, ke ni devas pensi, ke tre rapide ni povas ŝanĝi la rubrikojn, la tekstojn, do regule renovigi la retejon, por ke tiuj, kiuj vizitas la retejon vidas, ke la asocio vivas. Eble en la Sago, ni povas skribi tekston pri la uzmetodo de SPIP, kiel aldoni tekston.

Frederiko Scibor: La problemo estas, ke por skribi uzeblan tekston, vi bezonas 2, 3 paĝojn minimume, kaj oni bezonas iun, kiu redaktas tiun tekston. Kaj estas malfacila, oni devas aldoni fotojn de la ekrano. Do tio estas sufiĉe peza laboro. Pro tio ni decidis fari teknikajn grupojn, por instrui rekte kun komputilo en la kongreso, kaj poste vi povas fari la samon dum staĝoj, dum lokalaj kunvenoj, ktp. Mi esperas, ke en Grezijono, en Pluezek en Bures, ni povas proponi al la ĉestantoj, ĉu ili deziras scii kiel funkcias la retejo.

Dum pluraj jaroj ni malrapide kreskis, sed nun mi opinias, ke pli malpli 20 aŭ preskaŭ 30 kamaradoj de SAT-Amikaro scias aldoni artikolojn, kaj povas klarigi la aferon al la aliaj. Do mi esperas, ke tiel ni sukcesos.

Dua punkto: la oftaj demandoj. Tria punkto; la arĥivoj, kun du ebloj por ordigi (laŭ temo, laŭ dato).

Alia afero estas pri la kontaktoj. Kontaktoj, unue de la sidejo, due kontaktoj de la delegitoj, trie kontaktoj pri kursoj asocioj. Por tiu laboro, la problemo estas kiu laboras. Ni povas fari alvokon, ekz., en la Sago, por ke la kamaradoj sendu informojn.

Alia problemo, laŭ mi, estas ”Service de presse”, neniuj povas scii, kio estas ”service de presse”. Ĉar tio ne estas ”service de presse”, ne estas diri ”tiu gazeto parolas pri Esperanto, ktp”. Do mi proponas, ke ni trovu alian nomon. Mi proponas, ke ni havos du rubrikojn. Unu, kiu povas esti ”Documents”, kaj ”service de presse”, kiun ni povus

nomi "Dans la presse...". La du rubrikoj ne uzas saman manieron por ordigi. "Service de presse", oni povas nur ordigi laŭ datoj.

Françoise Guillaumé: Eble ni devus havi rubrikon, kiu montras, kio okazas ĉe SAT-Amikaro, kion ili faras, kion oni proponas.

Guy Martin: kiel "okazas". La grupo de Nantes kreis "okazis"

?: Kaj estus bone konigi ĉiujn informojn, kiuj koncernas ĉiuj lokoj, ne nur pri SAT-Amikaro. Iu ajn povas viziti la retejon, do oni devas havi belan aspekton de Esperantio.

Frederiko Scibor: por la rubrikoj, laŭ mi ni devas ĉion refari, kun nova strukturo. Mi povas proponi al vi, ke oni havas du specojn da rubrikoj. Rubrikoj pri la nuna vivo, ekz. "Dans la presse" kaj "Kio okazas en Esperantio?". Kaj la aliaj, kiuj povas esti pri SAT-Amikaro, dokumentaro, la Sago. Ni ne havas rubrikon "la Sago". Kiam la retejo estis kreita, estis la revuo SAT-Amikaro, la Sago ne ankoraŭ ekzistis. La gazeto estis pli interna revuo de la asocio

Guy Martin: Ĉu ni povas teknike publikigi la revuon, aŭ la pasintajn numerojn?

Frederiko Scibor: Du aferoj. La unua estas, ke jes ni povas, sed mi neniam havis la pdf (de Cyrille Decouture). Mia demando estis, ke ni publikigas post unu jaro, la plenan numeron. En la SAT-retejo, aperas la kovrilpaĝo de la nuna **Sennaciulo**, kaj kiam vi alklakas ĝin, vi havas la enhavon de la numero, kaj vi povas vidi la antaŭajn kovrilpaĝojn, kaj la antaŭajn enhavojn, vi povas elŝuti la tri unuajn paĝojn.

Do resume:

- malgrandigi la nombron de rubrikoj
- krei "FAQ"
- krei rubrikon "arĥivoj", kun du ebloj de prezentado
- krei rubrikon "kontaktoj", kun tri partoj: la sidejo, la delegitoj, la lokaj grupoj, kursoj, asocioj, ktp.

Mi povas ankaŭ informi vin, ke ni aĉetis por tiu kongreso la nomon en la reto sat-amikaro.org. Ni aĉetis ĝin por havi retadreson, kiu estas kongreso@sat-amikaro.org. Tiel por la venonta kongreso, ni donos la pasvorton al la kamarado, kiu zorgos la kongreson. Kaj ankaŭ ni povas krei retadreson por la kontaktoj, por la delegitoj (ekz. "akvitanio@sat-amikaro.org"), se la delegito ŝanĝiĝas, la retadreso ne ŝanĝiĝas. Do iu, kiu trovas presitan dokumenton de unu jaro ankoraŭ havas la bonan kontakton. Kaj ni povas ankaŭ krei ekz. "lasago@...".

Ni proponas ankaŭ trovi alian nomon por "service de presse": "dans la presse...".

?: ankaŭ oni povas sendi artikolojn (eltondaĵojn) de gazeto.

Frederiko Scibor: ni povas ankaŭ krei adreson "reto@sat-amikaro.org", por havi adreson, kiun pluraj kamaradoj povas konsulti.

Krei rubrikon "La Sago".

Kaj ni povas fari sistemon por ke aperas (en la unua paĝo) nur la gravaj artikoloj. Kaj nun en la menuo, ni havas "Pariza grupo" kaj "Vendea grupo", tiel oni povas imagi, ke la

asocio ekzistas nur en tiuj du grupoj. Mi proponas ke ĉi tie ni havos nur "lokalaj grupoj", kaj kiam oni alklakas tion, oni havas paĝon, kiu diras "pariza grupo", "vendea grupo", kaj por la aliaj grupoj, kial ne nur la ligoj. Por la grupoj kiuj ne estas membroj de SAT-Amikaro, tio povas esti problemo. Do la anoj de la asocio mem devus elekti aperigi ĉi tie aŭ ne.

2.3 Laborgrupo- libroservo-eldonpolitiko

Vito Markovo: Temas pri laborgrupo antaŭvidita pri libroservo kaj eldonpolitiko. Estas la du flankoj, unuflanke vendado, revendado de libroj flanke de SAT-Amikaro kaj alia flanko estas la eldona flanko de la libroservo, interalie la "Cours rationnel" pri kiu estas eble multe direnda, kaj eble aliaj eldonprojektoj, tio estas "Kiel traduki", kiu estas la lingva rubriko, kiu regule aperas en la Sago, kaj multege plaĉas. Kaj alia projekto estas la leciono, temas pri laboraĵo de Jean-Luc Tortel, kiu prilaboris novan Esperanto-metodon ekde la fama verko de Ionesco, momente nur eldonprojekto. Laŭ papere ambaŭ "Kiel traduki" kaj la "leciono" estis akceptitaj fare de la komitato por eldono nome de SAT-Amikaro, laŭprincipe.

Ansofi Markov: por fini kun la eldonpolitiko, kio estas por diskuti?

Vito Markovo: mi parolis ankaŭ pri la "cours rationnel", kies eldono 2006 revizita kolore kaj tiel plu, estas fakto, ke estas sufiĉe multaj fuŝoj, fuŝetoj, tajperaroj restis ĉar mankis korektlegado, tio bonege povus solviĝi alia eldonado, sed notinde estas, ke el 5000 ekzempleroj eldonitaj, restas ankoraŭ 4000 en stoko, do antaŭ ol plani plian reeldonon, eble estus inteligente provi solvi, ĉar ankaŭ havas stokproblemojn, kiel ni senbalastiĝu de tiu 4000 restantaj ekzempleroj.

Izabela Martinez: La prezo de tiuj libroj, kiuj restas, estis jam kompensita pro la vendado de la alia kvanto?

Vito Markovo : tion ne povas diri.

Ansofi Markov: Ĉar estas ĝuste tio, kiu la plej gravas, ĉar se la elpezo estis kompensita, vi povus tiam jam pensi pri reldono, kaj fari gravan rabaton al asocio, kaj tiam tiuo, kio restas vendiĝos tre rapide.

Izabela Martinez: Vi ankaŭ povus antaŭanonci la eldonon, kaj akiri aĉetpromesojn, eĉ antaŭpagojn.

Veroniko Girard: Ne nepre necesas antaŭmendoj.

Ansofi Markov: Mi povas diri, ke "Cours rationnel" estas ŝatata lernolibro, ĉar ĝi estas sufiĉe klara kaj la nova aspekto kun koloro plaĉas, sed kompreneble, ĝi povas esti plibonigita

Vito Markovo: por la plibonigo, estas notinde, ke la litertipoj estis taksitaj tro malgrandaj, do en onta eldono, ili estus pli grandaj, kaj eĉ la formato entute de la libro estus alia, tiel ke oni ne bezonu ĉion reenpaĝigi, oni simple havu ion laŭ la formato de "Vojaĝo en Esperantolando", iom pli granda ol A5.

Izabela Martinez: Sed se vi havas la tempon antaŭ ol eldoni la novan, vi povas anonci, tiel ke ĉiuj homoj donas sian vidpunkton, ĉar kiam tiu aperis estis multege da kritikoj, tiel ĉiuj povos tuj sendi konsilojn kaj partopreni la aferon. Des pli ke tiel la partoprenintoj emos aĉeti la libron.

Veroniko Girard: Ĉu vi havas sperton pri lernantoj, kiuj lernis per la nova, ĉu malgraŭ la eraretoj tiu libro plaĉas al ili?

Ansofi Markov: Ni decidis uzi tiun libron tuj, kvankam ni tuj vidis, ke estas plenaj de eraroj. Kun miaj lernantoj, ni funkcias tiamaniere, ke mi zorgas pri la duagrada nivelo kaj miaj lernantoj de la duagrada nivelo instruas al tiuj de la unuagrada nivelo, pro problemo de tempo, kaj ili uzas "Cours rationnel", tio ebligas al ili kontroli ilian scion, kaj ili facile rimarkas la erarojn.

Vito Markovo: do, krom evidente tiu problemo pri tajperaroj, kiu estas facilege solvebla, estos pli grandaj litertipoj, kaj ankaŭ pli taŭgaj koloroj, eble alia papero, kiu malpli sorbas la inkon.

Ansofi Markov: Mi deziras tamen substreki la interesan flankon de la nova eldono, tio estas la rubrikoj pri historio kaj kulturo, kiu ebligas al la novaj lernantoj tuj konatiĝi kun la Esperanta kulturo.

Vito Markovo: la celo estas reeldoni preskaŭ la samon, sed sen la fuŝoj.

Ansofi Markov: kaj necesus fari skipon por tio.

Vito Markovo: jes, la laboro estas kvazaŭ jam preta. Cyrille Decouture estas komisiita de la komitato zorgi pri tio, li jam kontaktis la eldonanto, kiu estas fakte la sama presisto kiu zorgas pri la revuo.

Ansofi Markov: mi supozas ke la tuto estas en komputilo

Vito Markovo: jes, kaj la ideo ne ŝanĝi la enpaĝigon, ne aldoni paragrafon, kaj tiel plu, estas ke oni povu facile eldoni.

Izabela Martinez: oni povas eble aldoni foliojn.

Ansofi Markov: oni povas vidi tion por tria eldono.

Veroniko Girard: laŭ mi oni ne devas eldoni multe.

Vito Markovo: jes, la lasta eldono 5000 ekzemplere verŝajne estas la lasta fojo kiam SAT-Amikaro eldonas tiom grandkvante, ĉar nuntempe la tekniko kun komputilaj dokumentoj ebligas je favoraj prezoj eldoni malgrandkvante.

Plia projekto estas projekto eldoni libroforme le bildostrion de Serĝo "Ĉe la lago", kiu aperas en la lasta paĝo de ĉiu Sago. Serĝo komencas havi sufiĉe ampleksan kolekton kaj povas esti bona ideo eldoni tion. Pri bildstrioj ne ekzistas multe en Esperanto, estas efektive UFE, kiu multe aktivigas eldonante aferojn kiel "Tinĉjo", "Ete Spiru" kaj "Gastono", kaj plejnove tiu "Ratman", kiu estas kunlaboro kun la italoj, kaj estus, laŭ mi, bone se SATamikaro zorgus pri tio. Kaj temas pri originala bildstrio, kaj tio estas avantaĝo. Plej bone estus kvazaŭ bildstria formato, kiel iu "Tinĉjo" aŭ iu "Gastono Lafuŝo". La formato normale de la epizodoj estas duonpaĝo. Povas esti sur duono de la paĝo la jam publikigita en la revuo, kaj plejofte Serĝo preparis alian alternativan version, kiun li ne publikigis, kaj tiel li povus kompletigi, malpligrande, sur la sama paĝo, tian aferon.

Izabela Martinez: Sed tio estas papera afero, kaj vidu pri la "Junulkurso", kiu aperis nigre-blanka, mi mem kolorigis la tutan libron, mi havas 80 diapozitivojn, kaj mi instruis la infanojn pere de tiu, kaj por la libro de Sire, eble oni povas havi la eblecon projekcii.

Ansofi Markov: jes efektive mankas bildaj eldonoj.

Veroniko Girard: Eble mi povas paroli pri kio mi faras nun. Mi enpaĝigis "La kato de la rabeno". Mi legis kion Claude Gerlat skribis, kaj mi remetis en la bildstrio de Johan Schwartz la dialogojn, en la vezikojn. Poste ni devos peti de Johan Schwartz la permeson

2.3. LABORGRUPO- LIBROSERVO-ELDONPOLITIKO 2. DUA LABORKUNSIDO

fari ĝin Esperanten, pro la laboro de Claude Gerlat estas duonfarita.

Ansofi Markov: Kaj mi ankaŭ havis ideon pri tio. Mi malkovris kelkajn malgrandajn rakontojn kun bildoj por infanoj, kaj mi deziras traduki, kaj poste necesa rilati kun la eldonisto. Mi malkovris rakontojn de Leo Tolstoj, por infanoj, kaj kiam vi scias, ke Leo Tolstoj estis Esperantisto, estus bone eldoni ion de li. Kaj mi rimarkis ankaŭ kelkajn aliajn librojn por infanoj, kiujn mi ŝatus traduki se la eldonpolitiko iras en tiu direkto.

Veroniko Girard: por infanoj, estus bonege, laŭ mi.

Ansofi Markov: Kiam temas pri la libroj por infanoj, estas relative facile traduki, sed ofte la libroj por infanoj estas interesaj pro la desegnoj, kaj pro la rakonto. Mi elektis rakontojn, ĉar mi estis seduktita de la rakonto, sed ankaŭ de la desegno, kaj mi pensas, ke ni devas konservi la originalajn desegnojn. La plej bone estus, ke la sama eldonisto eldonu en Esperanto, kaj la libro samforme, nur la teksoj estu en Esperanto, kun eble unu paĝo de klarigoj por la Esperantistaj legantoj... Ne nepre dulingvaj, ĉar estas libroj por malgrandaj infanoj, kaj la bildoj multe pli gravas ol dulingva teksto, precipe kiam temas pri infanoj, kiuj apenaŭ scias legi, la teksto estas malpeza, kaj la intereso estas allogi maljunajn lernantojn.

Veroniko Girard: ni povus peti de la SAT-Amikaranoj, ĉu ili estus interesataj partopreni skipon, kiu povus cerbumi pri la politiko de la libroservo.

Ansofi Markov: Ni povas proponi al homoj, ke ili faru mem proponojn por la venonto. Dum estas precizaj proponoj, ni povas programi la diversajn eldonojn sinsekve, sed se venas pli da proponoj pli konkretaj, pli tujaj, ni povas rekunveni.

Vito Markovo: [eldon-politiko] estas planoj, projektoj (...), sed ankaŭ pri kiu ni eldonas, ĉu ni eldonas nur pure neŭtralajn aferojn, aŭ ĉu ni eldonu aferojn, kiuj estas iel en rilato kun la temoj, kiuj tamen estas la ĉefaj zorgoj por SATamikaro en rilato kun laboristaj medioj ktp.

Ansofi Markov: Kia engaĝiĝo, ekzemple, ĉar tio, kion ni proponis, estas precipe eldono de lernolibroj, kaj de bildoj por komencantoj, kiuj bezonas vidi bildojn kaj por junaj lernantoj, sed ni ne precizis ĉu ni deziras engaĝitajn...

Vito Markovo: fakte, ke ni parolas pri eldonado de libroj uzeblaj pri pedagogio, jam tio estas politiko. Nun ni transiru al libroservo. Entute estas deko da kvadratmetroj en lia hejmo [de Bernardo], kaj estas pliaj dekdu kubmetroj da libroj en garaĝo, kaj li planas liberiĝi de tiu librostoko, ĉar li intencas forvendi la garaĝon.

Izabela Martinez: ankaŭ estas tiu ĉambro en la loko de SAT.

Vito Markovo: ĉu ni decidus lupreni lokon, kiu ni stoku la materialon, aŭ ĉu ni elektas alian solvon. Kaj ankaŭ alia afero: ĉu en la venonto, ni planas konservi tiel monstran stokon, entute 22 kubaj metroj.

Ansofi Markov: estas evidente ke ne, ĉar la nuna politiko de ĉiuj librejoj estas eldoni la kvantojn, kiujn oni povas rapide vendi. Kaj pro la facileco fari novajn eldonojn pri iu ajn libro, ni devas havi nur malgrandajn kvantojn. Ni devas kalkuli ekzakte laŭ la elspezoj de ĉiuj eldonoj, tiamaniere, ke ni povu rapide reenpoŝigi la elspezon, kaj la resto devas esti eldonita iom post iom laŭ la bezono.

Vito Markovo: la ideo estas ĉu ni provas lupreni ie en Parizo multekoste garaĝlokon aŭ ion tia, aŭ aĉeti ion, aŭ ĉu ni zorgu plej rapide senbalastiĝi de la stoko, kiu ĉefe konsistas el eldonoj de SAT-Amikaro.

Vito Markovo: por la jaro 2008 ni provu daŭrigi laŭ tio, kiel funkciis ĝis nun kun Bernardo, provi iom spertiĝi, elturniĝi niaflanke.

La katalogo estas ĉe la retejo, sed PDF-forme ne vere uzebla kiel datumbazo. Eble estus bone se la katalogo estus tabele uzebla por serĉi titolon rapide kaj tiel plu, estus bone povi disponigi tian servon sur la retejo de SAT-Amikaro.

2.4 Laborgrupo pri lokaj grupoj

Ĉeestantoj: Marcelo Redoulez, Robin Beto, Ansofi kaj Vinko Markovo, Izabela Martinez, Franjo Leveque

Marcelo Redoulez: Eo-Gironde kreaĵo de Leo. Regiona, nun departementa asocio. La animadon transprenis Marcelo ĉeestas la monatan rendevuoj. Inter tiuj monataj kunvenoj lokaj grupoj instruas esperanton. Sentas sin devigata reveki la grupon en Cenono. Malfacila nur pro tempomanko. Nepre devos firmigi la postenon por ne esti vokita de la elektitoj de la urbodomo. Alia grupo ĉirkaŭ Joel Lajus kiu instruas en Libourne kaj Galgon (apuda vilaĝo), en Sainte-Foy la Grande kun Marielen. Estis alia ĉirkaŭ Jean-Seb Brillaud en Pessac.

Ansofi Markov: kiom da homoj.

Marcelo Redoulez: 40 kotizpagantoj en Eo-Gironde. Ne ĉiuj estas SAT-amikaraj membroj. La aliaj estas esence loka aŭ SAT-Amika. UFE konsideris nin kiel Eo-dezerto. Ne ekzistas sudorienta federacio. Nur loka grupo ĉirkaŭ Gisèle Gisard.

Robin Beto: regionskale nenion faris. Loke grupeto el seso da homoj, kun du aŭ tri SAT-Amikoj. Ĉijare ne estas kurso pro manko de energio.

Ansofi Markov: ĉu pro supersutiĝo de diversaj kunvenoj?

Robin Beto: jes, sed venontjare povos restarigi kursojn. Samkiale ne kontaktiĝis kun aliaj grupoj.

Ansofi Markov: ĉu la grupeto tamen iom renkontiĝas?

Robin Beto: pli malpli, ĉar ĉiuj inter 20 kaj 40 jaroj, kaj havas multajn okupojn. Renkontiĝas por babili pri diversaj politikaj kaj socialaj temoj. provas elturniĝi por ĉiufoje trovi okazon paroli pri SAT-medio.

Izabela Martinez: en Angulemo estas du asocioj: association charentaise pour l'Eo. Ne "espérantiste". Kultura asocio por ĉiuj. La homoj maljuniĝis. 16 personoj en la grupoj. Deĵorado en urba senpaga lokalo. Ĉiumonate escepte la unuan, deĵorado por ebligi kontaktojn. Nun nova prezidantino: Dominique Couturier. Laboras por si mem. Faras multon sur interreto. Tuta laboro farita de ili ambaŭ. Ne agadas loke. Agas laŭ propraj kriterioj. Tial atenti, ke oni celas ĉiujn homojn. Oni lasu al ili la elektelecon. Ĉeestas kongresojn. Sendependa asocio. Neniam volis aparteni al la federacio de UFE. En 45, Eo vekiĝis, jam estis malamikaj rilatoj. Nun la aferoj glatiĝas. Komencas per la kursoj. Dominique Couturier estas verdulino, kaj multon fari sur ĉi-tiu tereno.

Franjo Lévêque: novalvenantino en la movado, kaj ankaŭ en la regiono de Baugé. Loĝas en Grezjono de 4 monatoj. Sekvas la kurson de Phil en Baugé. 16 lernantoj. Antaŭe estis en Bretonio. Pro sia profesio neniam povis sekvi kursojn sed agadis kiel vicprezidantino de Eo-22.

Ansofi Markov: ĉu konservis rilatojn kun la bretonanoj?

2.4. LABORGRUPO PRI LOKAJ GRUPOJ ĈAPITRO 2. DUA LABORKUNSIDO

Franjo Lévêque; jes; helpas por traduki artikolojn, kaj doni informoj.

Ansofi Markov: do povas informi.

Franjo Lévêque: jes, bone fartas, sed pro multaj translokiĝoj, kelkaj problemoj por pluevolui. Ankaŭ ge-Klopoj translokiĝis. Tamen bonaj projektoj por la estonteco. Bedaŭrinde malkreskas la procento de novaj lernantoj.

Ansofi Markov: ĉu ankoraŭ laboras?

Franjo Lévêque: ne plu, do pretas preni respondecojn, sed devas preni spurojn.

Ansofi Markov: ankoraŭ ne emeritiĝis, kaj tial trafas multajn malfacilaĵojn, i.a. ĉar instruistino en la nacia edukado pli kaj pli privatiĝanta. Antaŭ kelkaj jaroj kurso en la liceo. Nun neeblo daŭrigi ĉar lernantoj ne plu estas liberaj por havi aktivecojn krom la devigaj. Teorie ĉiusemajne gvidas kurson en Ilo, asocio en Kastelforto, kiu preparis la kongreson en julio. Membroj laboremaj kaj SAT-emaj, kvankam novbakitaj. Du niveloj: instruas teorie al la duagrada nivelo. Kaj la duagradanoj instruas la unuagradanojn. Ĉiuj bonvolemaj. Provas labori regule sed pli kaj pli da malfacilaĵoj. Duagradanoj pli kaj pli superŝutataj. Etoso tre bona. Progreso ĉiufoje kiam povas renkontiĝi.

Izabela Martinez: siatempe kolektiva korespondado. Tre efika, daŭris tre longe.

Ansofi Markov: projektis instali porinfanan korespondadon kun Ĉinio kun media-teko, sed la afero ne stariĝis pro diversaj ĉiutagaj problemoj. Krome konservis rilatojn kun antaŭaj lernantoj, nun studantoj en diversaj lokoj. Ne perditaj por la movado sed malaperis pro batalneceso.

Izabela Martinez: nun ekzistas interreto, kaj multaj havas reton.

Ansofi Markov: efektive agadas individue. Rilatoj kun diversaj esperantistoj, per retkursoj. Pli aŭ malpli ligitaj. Stulta afero: tre afabla letero de antaŭa lernantino, nun flegistino. Ĉar engaĝita en la movado de la lernantoj, ne havis la tempon averti ŝin.

Marcelo Redoulez: rezulto de la lasta kongreso. Dum la tuta jaro la asocio multe laboris, poste bezonis iom da tempo por reorganiziĝi. Financa bilanco pozitiva (3000 eŭroj). La sumon ni dividis. Duono al SATAm, la alian por la preleg-vojaĝo de Kimie. Tio devus instigi aliajn grupojn.

Ansofi Markov; same, ILO kiu organizis la SAT-kongreson. Efiko sur la grupo, kiu estas tre interesata de la movado. Multaj ideoj pri farendaĵoj. Bilanco nefinita (kontoj kontrolataj). Verŝajne pozitiva, sed la grupo decidis per la mono helpi al partopreno en kongresoj kaj staĝoj. Ankaŭ bona interkonatiĝo ĉiuokaze. Okazo multe estimi la aliajn/

Marcelo Redoulez; substrekinde, ke tion organizi estas federaciiga.

Vinko Markovo: klarigas pri la agado de la pariza grupo, pri kiu ĉiuj informoj estas kolektitaj en aparta rubriko en la SAT-Amikara retejo.

Ansofi Markov: ankaŭ partoprenas ILO-anoj.

Vinko Markovo: ni hodiaŭ tute klare vidis, kial estas bezonataj lokaj grupoj kaj pli efika informocirkulado intere de la asocio. Eble la membroadresaro povus utili por revigligi la asocion, se ĝi estus transdonita al la lokaj delegitoj.

Izabela Martinez: en aliaj asocioj, apud la estraro ekzistas konsilantaro, kun rolo analoga al tiu de la delegitaro.

Ĉapitro 3

Tria laborkunsido

Lunde matene.

Prezidas Guy Martin

Juliette Ternant: komence pritraktos la tri punktojn pri la agadraportoj. Transdonas la parolrajton al la prezidanto.

Guy Martin: jesinte pri la prezidanteco pensas rekte al Ferdi Vince. Ankaŭ li unufoje prezidas, sed malpli bone ol Marcelo regas la lingvon kaj la kutimojn de la asocio. Petas indulgon. Memorigas, ke ĉiu kongresano rajtas interveni, parolante ĉe la mikrofono, laŭte sed ne tro longtempe. Daŭrigo per la raporto pri la referendumo.

Thérèse Pinet: raporto legota en la venonta SAGO. Nur resumos pri kelkaj punktoj. Pli la titolo, pli draste: kunigu niajn agadojn kaj fortojn. Unufoje rigardis kaj vidis, ke multaj estas tre koncizaj, kaj multaj asociaj aktivuloj ne plenigas la referendumilon. Petegas ke venontfoje respondi pli detale kaj multe pli longe. Rilatoj inter la membroj kaj la komitato estas la kongreso kaj poste ĉi tiu referendumilo. Ne temas pri centralizado de la afero. Ĉiuj membroj rajtas memstare agi, sed necesas tamen kunordigi la fortojn. Ĉies helpo bezonata. 90 respondoj. Kutima meza nombro. 83 jesis por la membroj de la nova komitato, 8 sindetenis, ofte pro nesufiĉa kono de la kandidatoj. Malmultegaj anoncis sian informon partopreni. Tamen kongreso sufiĉe vigla kaj tre agrabla etoso, eble pro la kunmanĝado. Paul Girard 93-jara: "ne plu povas, sed tre plezure ricevas kaj legas la SAGO". Donos poste al la respondeculoj la nomojn por diversaj taskoj. Nur 9 manifestaciaj pri neesperantistaj aferoj. Multaj esperantistoj kiam radio esperanto manifestacioj. Regionaj delegitoj: nur du jesis. Problemo estas ke tiuj, kiuj interesiĝas pri tio ne interesiĝas pri la referendumo. Unu ne ŝatas la delegit-sistemon kaj preferas adresaron de ĉiuj membroj. Ĉu la SAGO respondas al la atendoj? Plimulto jes, kelkaj nur parte, kaj kelkaj negativaj sed deziras plibonigi la revuon. Nur unu junulo proponas diversajn rubrikojn. Dosieroj kun apartaj respondeculoj, instigi al recenzoj, movad-historio ktp... Alia lernanto proponis sin pri pluraj aferoj. Frazo "via manio esperantigi ĉiujn proprajn nomojn estas perfekte kontraŭzamenhafa kaj kontraŭesperanta". Du aliaj samopinias. Pluraj indikas sian precipan ŝaton pri la rubriko de A. Andrio. 7 aŭ 8 duonspertaj lernantoj plenigis la referendumo.

Konklude 2004: "igi la membrojn malpli anonimaj". Fakte la referdumilo de 2007 aparte plenigas siajn rolojn konatigi junajn SAT-Amikoj kiuj povos rapide pluteni la torĉon.

Neniu rimarko.

3.1 Lokaj grupoj

Vinko Markovo: rememorigas la celon. Kaj resendas al pli poste.

3.2 FEI

Thérèse Pinet: rememorigas, ke FEI estas lingva institucio de UFE kaj SAT-Amikaro. Je la dispono de ĉiuj esperantistoj, eĉ komencantoj. Konsistas el 15 membroj. 7 delegitoj de UFE. Pluraj ŝanĝiĝis en la jaro 2007. En la novaj alvenintoj X. Dewideahaem iĝis sekretario. 5 delegito de SAT-Amikaro, de kiu vi aparte povas peti informojn kaj konsilojn; Klaŭdo Roux, Suzanne Bourot, Marcel Redon, Terez Pinet, Sergo Sir. Aldone tri alelektitaj membroj. Necesas plimulto de tri kvaronoj de la delegitoj. Tri alelektitoj: Marielen Dezer, Janine Dumoulin, Michel Duc Goninaz. Nombro de ekzamenatoj varias laŭ la jaroj. En la lerneja jaro 2006-2007, okulfrape malpli ol la du pasintaj jaroj. Sed same estis en 2001-2002. Tio ne estas la koro de la afero. Koro estas, ke multaj plendas, ke ili nenion scias pri la ekzamenoj. Nenormale, ĉar multaj klarigoj ekzistas. Oficialaj blankaj provoj ebligas prepari la kandidatojn. Ĉi-tie 6 trapasis kaj sukcesis la ekzamenon. [aplaŭdoj]. Tion ili ne ricevis en "pochette-surprise"-o, ĉar la ĵurio ne estis aparte milda. Pri la kursoj ne havas raportojn pri aliloke ol en la sidejo. En la sidejo estas 5 grupoj: Hélène Bonjour, Georges Meilhac, Thérèse Pinet, Elizabet' Barbay, Vinko Markov. Entute ĉirkaŭ 30 kursanoj, sufiĉe viglaj kaj fidelaj.

Guy Martin: kio pri la evoluo de la ekzamenoj en la KERK?

Thérèse Pinet: demando metita. Problemo ĉar la tria grada estas en Esperanto.

Sergo Sir: aldonas, ke KERK tute ne estas en la celoj de FEI. Debato enkondukita en la SAGO, sed neniu respondo.

Guy Martin: petas voĉdonon pri la agadraporto.

O, O kontraŭ. 2 sindetenas. Ceteraj aprobas.

3.3 Kasraporto.

Juliette Ternant raportas por Andreo Sadier. La raporto aperos en la venonta SAGO. Fotokopioj pri la detaloj estas disponeblaj. La ĉi-jara saldo estas 64 000 eŭroj anstataŭ 52 000 pasintjare.

Guy Martin: vokas al demandoj.

Petro Levi: ŝajnas, ke la kasisto fieras, pri tio ke la komitato sukcesis redukti la elspezojn. Miras pri tiu fiero. Ĉar tio povas havi ankaŭ negativajn aspektojn. Ekzemple propagando estas kosta afero. Ĝenerale entreprenoj, kiuj reduktas la elspezojn estas tiuj, kiuj iom post iom malprogresas. Miras do.

Aplaŭdoj.

Juliette Ternant: redukto de la elspezoj ne koncernas la propagandon. Unu el la motivoj: en iu momento ne estis eble ekspedi la revuon favorpreze. Supozas, ke kiam la kasisto parolas pri la redukto de la elspezoj, temas pri tio kaj ne pri la propagando.

Sergo Sir: ĉu en tiu buĝeto influas la fakto, ke la apuda butiko ne estis aĉetita?

Juliette Ternant: ne povas respondi.

Robin Beto: laŭ mi influas, ĉar decido pri neaĉetado temis en 2007.

Juliette Ternant: ne havis influon, ĉar oni fiaskis.

Sergo Sir: se la afero fiaskis, havis influon, ĉar ne la samaj ciferoj prezentiĝus.

Juliette Ternant: konsentite en tiu senco.

Ansofi Markov: sur la papero videble, ke la saldo kreskis. Do mono tiu mono estus uzebla por la aĉeto.

Juliette Ternant: la asocio havis iom da mono kiu ne aperis en la paperoj, kaj transiris tra nekonataj kontoj. Temis pri donacoj.

Ansofi Markov: iomete embarasita, ĉar ŝajnas al mi, ke havi grandan sumon sur la konto de asocio, kiu ne havas planon profiti, ne estas tre normala afero. Eble do tio ne daŭru tro longe, ĉar en kazo de kontroloj riskus esti problemo. Mono eble uzota iel ĉu por lokalo, ĉu por io alia.

Robin Beto: ĝojas, ke informservo elspezis por bonegaj propagandiloj. Nepre uzu la propagandomaterialon.

Guy Martin: ne komprenas, kial la kasisto ne prezentas bilancon. Kiam vidas tiun konton, povus diri, ke sidejo ne ekzistas. Ĉu ekzistas ŝuldoj?

Juliette Ternant: ne.

Guy Martin: miras, ke ne estas bilanco.

Juliette Ternant: la bilanco estas farita, sed ne aperas en la SAGO, sed petebla al la kasisto.

Izabela Martinez: ni naĝas en nubo, ĉu?

Huguette Ménard: verŝajne estas kontokontrolistoj. Ĉiujare devige provi neprofiton. Tiukaze vere speciala afero, ĉar mono bezonata por aĉeti lokalon. Petas, ĉu transdoni al la kasisto kaj kontrolistoj, ĉu eblus pruntedoni la monon al esperantaj asocioj, kiuj urĝe bezonus por mallonga tempo, ICEM-Esperanto ekzemple? Ĉu eblas pruntepeti iom da mono se estas tro en la kaso.

Juliette Ternant: ne respondebla, ĉar pridiskutenda en la komitato.

Thérèse Pinet: krome mono bezonata, ĉar nur en la sidejo multaj libroj. Necesos aĉeti lokon.

Juliette Ternant: mono uzita por la unua aĉeto pere de la donacoj. En momento estis sufiĉe por aĉeti sidejon.

Bernardo Schneider: en la nuna situacio, absolute stulta, ĉar mono devalutiĝas kaj perdiĝas.

Huguette Ménard: tute ne deziris kaŭzi malfacilaĵoj, sed pensis pri la tro granda sumo por pagi impostojn. Tial petis ioman prunteprenon. Devas ankaŭ preparoli la aferon kun la kasisto. Nur eventuala demando.

Guy Martin: ĉu ekzistas kontokontrolistoj?

Juliette Ternant: jes ja. Lea Chevrolat kaj Lucienne Cudré.

Izabela Martinez: ne la bilanco.

Juliette Ternant: kontrolo nur de la kontoj, ne de la bilanco nek la raporto.

Veroniko Girard: kasraporto estis kontrolita de kontrolantoj, ne kontrolistoj.

Guy Martin: en tiu raporto oni ne parolis pri libroservo. Stoko de libroj kaj mono, ĉu?

Bernardo Schneider: mono de la libroservo estas tute aparta afero. La profito estis destinita al aĉeto de la nova sidejo, kiel estis pri la antaŭa.

Guy Martin: SAT-Amikaro posedas librojn, ĉu ? Do la diversaj sub-kontoj devus aperi en la bilanco.

Bernardo Schneider: efektive valoro de la libroservo kaj de la sidejo ja devus aperis en la kontoj. Tre alta valoro de la sidejo kaj de la stoko. Profito bezonata por reldonoj.

Izabela Martinez: kiom da kaso?

Marcelo Redoulez: persone deziras danki Andreon por longa laboro. SAT-Am multe ŝuldas al li. Tamen ne voĉdonos favore al tiu raporto kiu ne estas vera bilanco. Ĉio evoluas, ankaŭ la kontoprezentado kaj preparado. Do kontraŭas tiun raporton ne kontraŭ Sadier sed kontraŭ la nuna aspekto. Tial levos la manon kontraŭ.

Izabela Martinez: ankaŭ mi balotos kontraŭ.

Robin Beto: flanka demando. Libroservo sufiĉe grava enspezilo. Ĉu je iu momento estos voĉdono pri la kasraportoj, bilancoj de la libroservo? Tio estas demando, sed ne pro malvido.

Thérèse Pinet: intervenantoj pravas. Evidente bilanco estonte fareda. Sed asocio kiu ne petas subvenciojn ne estas devigataj prezenti bilancojn. Evidente neceso alveni al pli klaraj kontoj.

Flo Martorell: Eurokka ne havas subvenciojn, sed tamen okazis kontrolo, kaj feliĉe la kontoj estis klaraj.

Ansofi Markov: nur demandas, ĉu la kontoj de SAT-Amikaro estas ne klaraj nur pro la granda sumo ne uzata, aŭ ĉu pro aliaj kialoj, ekz-e aparta konto de la libroservo. Ne komprenas, kio ne klaras. Komprenas, ke grandaj sumoj ne devas longe resti. Ĉu eble listigi la gravajn problemojn por solvi ilin?

Juliette Ternant: unu el la kialoj de la malklareco estis la ricevo de donaco, kiun la fisko repetus. Tri kontoj: asocio, libroservo kaj pariza grupo. Ĝis antaŭ du monatoj la kontoj de la pariza grupo estis en la ĝeneralaj kontoj.

Ansofi Markov: ne diros kiel Izabela ke estas eĉ pli fuŝe ol antaŭvidite. La pariza grupo estas tute aparta, kaj ni ne havas kialon okupiĝi pri tio nune.

Juliette Ternant: tamen la kontoj de la pariza grupo devus esti kontrolataj de la asocio.

Veroniko Girard: la pariza grupo estas parto de la asocio SAT-Amikaro. Aparta CCP-konto, sed administraĵoj plenumitaj de la prezidanto de SAT-Amikaro.

Guy Martin: pariza grupo leĝe ne estas asocio, ĉu? Do iliaj kontoj estus raportindaj en la tuto. Responde al Ansofi, ne sufiĉe klaras la fakto, ke ne la tuta konto estas havebla. Nur parto havebla. Eble necesos pli poste rigardi pli precize la problemojn.

Ansofi Markov: denove pardonpetas pro la ĝena demando, sed ĉu ne estus asocia intereso adaptiĝi al la franca leĝo? Tamen, riskoj pri kontroloj de la franca ŝtato. Pariza grupo unu inter aliaj. Aliaj grupoj tre ligitaj kun SAT-Amikaro. Ĉu tiuj grupoj devas esti leĝe ligitaj kun SAT-Amikaro aŭ apartaj aferoj. Ĉu multaj apartaj asocioj ne estus protekto? Alia demando, ĉu pri tio diskuti alimomente.

Juliette Ternant: pariza grupo ne havas statuton. Parto de la asocio. Aliaj grupoj sendependaj povas esti parto de la asocio. Normale, ke la asocio regas tion kaj parolas pri tio.

Ansofi Markov: ĉu ne estus leĝe interese havi apartan asocion, kiel funkcias aliaj grupoj en Francio? Ĉu tamen ne problemoj ligitaj? Se la loka Pariza grupo sendependa, povus memstare funkcii kaj kontoj povus funkcii aparte.

Sergo Sir: kial la parizanoj havus apartan privilegion?

Juliette Ternant: efektive kial ne modifi tion? Nun kvarono de la kotizoj iras al la pariza grupo, ĝi ne plu ricevas la monon? Ĉio modifebla, sed SAT-amikaro estas franca asocio en la kadro de la franca leĝo 1901. Evidentente ĉio modifebla?

Bernardo Schneider: vere surpriziĝas, ke tiom da tempo perdita. Pariza Grupo bagatelo el financa vidpunkto, krom pri kongresa organizado. Kial perdi tiom da tempo por tiu afero?

Ansofi Markov; demandos plu alifoje.

Guy Martin: proponas nunan voĉdonon pri la kasraporto. Pri la laborgrupoj ni aŭskultos raportojn poste. Nun voĉdono pri la kasraporto.

Huguette Ménard: estas normale la raporto de lasta jaro. Tio ne restos pro la pariza prezo por la kongreso.

9 kontraŭ; 24 sindetenoj. 7 por. 1 voĉdonrifuzanto.

Marc Noulin: du malsamaj afero; aĉeto de la lokaloj kaj kontoj. Absolute kontraŭ Sadier kiu sendis leteron al la notario, sed kasraporto estas alia afero.

Sergo Sir: kontraŭa vodonado ankaŭ pro neklareco inter la subkontoj. Ekzemple miris pri la libroserva mono en Ĉamberio.

Guy Martin: substrekas, ke oni vidas nur unu parton de unu subkonto.

Juliette Ternant T: prezentas la novan komitatan liston por la jaro 2009. Voĉdono en la referendumo. Mem emeritiĝo jarfine el la komitato kaj ĝojas prezenti la liston:

- Guy Cavalier, kiu jam faris, -as kaj -os laboron.
- Veroniko Girard: kapabla, inteligenta, ĉarma, bezonato.
- Maksimiliano Gverino: lernanto, ankaŭ pretas partopreni
- Fil Guichet: tre kompetenta i.a. pri informadikaj aferoj.
- Vito Markov, simbolo pri juneco.
- Thérèse Pinet, unu el la delegitoj de FEI; respondecas pri la kursoj kaj pri la ekzamenoj.
- Andreo Sadier, kasisto; nura restanta maljunulo
- Dominiko Simeone, prezidanto, laŭdinda ĉar ricevis subite la rolon.

Dum la referendumo estos voĉdonota bloke. Povas esti ĝis 10. Du pliaj povas prezentiĝi lastminute. Formetinduloj ankaŭ nun.

Aplaŭdoj.

3.4 SAT-kongreso.

Vinko Markovo: skize prezentas la aferon. Programo: laborgrupoj, sociaj forumoj, kultura programo, veturado.

Guy Martin: revenas al la kontoj. Kasraporto rifuzita. Do la komitato devos prezenti novan raporton, voĉdoninda pere de referendumo.

Dominiko Simeone: petos alian prezenton. Vickasisto bezonata, por helpi al laŭleĝa prezentado de la kontoj.

Jeannik Marolleau: ĉu ne necese laŭleĝe kunvoki ĝeneralan kunvenon?

Guy Martin; komitato decidus laŭ la leĝa maniero.

3.5 Estontaj kongresurboj.

Frederiko Scibor: por la 2009a kongreso, ekkomencis labori proksime de Paŭo, en Atlantikaj Pireneo, en Oloron sainte Marie, 22 000 loĝantoj. Ne eblas firme diri, ke la kongreso okazos tie, pro salonrezervado. Krome bezono pri klara decido de la loka grupo. Urbo atingebla per trajne. Aviadilejo en Paŭo, je 30 kilometroj. Interesa urbo pro bela kaj bone ekipata kongresejo. Profesia sonsistemo kaj prizorganto. Samloke loĝejo kaj manĝejo. Do bona materiala etoso. Ege malnova urbo kun belaj strato piedireblaj. Esperas, ke informoj aperigeblaj en la SAGO antaŭ la kongreso. Tamen se aliaj emas zorgi ili faru, ĉar tio ankoraŭ tute ne estas certa.

Bernardo Schneider: konsilas kiel eble peti plej rapide oficialan akcepton, ĉar nur kelkajn monatojn antaŭe la urbestraro anoncis, ke la salono estas disponebla.

Frederiko Scibor: urba kongresejo, sed kultura asocio havas prioritaton por rezervi la lokon. Devas havi akcepton de tiu asocio por rezervi la kongresejon unujare antaŭe. Normale akcepto en oktobro, sed deziras havi tion pli frue.

Henriko Graven: estas el la sama grupo, kaj vidis ke estos multa laboro fareda.

Frederiko Scibor: ne komprenas, do ne povas klarigi. En la loka asocio afero priparolita, sed ankoraŭ ne estis klare decidite.

Guy Martin: transiras al raporto pri laborgrupoj.

3.6 La SAGO.

Raportas **Sergo Sir.** Ĉefa punkto: malprecizeco de la dezirata celo por la gazeto. Ĝis nun iom ajnista. Ĉu propagandilo? Ĉu ligilo inter membroj? Ĉu esprimilo? Eble kelkaj artikoloj pli bone lokendaj en Sennaciulo. Sed ne ĉiuj SAT-Amikaranoj estas SAT-anoj. Ĉu ilo por lerni kaj trejniĝi pri esperanto? Ĉu paĝo por la komencantoj. Ĉefa demando. Kvankam homoj ĝenerala kontento, eble nur ĉar estas nenio alia. Dua punkto: ĉiuj plu deziras francan parton. Sed ankaŭ por tiuj paĝoj la preciza celo restis nedefinita. Ankaŭ leviĝis problemoj de la kunlaborantoj: absolute nepras sendi pli da artikoloj. Ankaŭ indus pligrasigi la korektantoteamon. Sufiĉas havi retadreson por ĉion ricevi sen devigo respondi al ĉio. Kiam akceptis transpreni la enpaĝigon, tiam ankoraŭ partoprenis Henriko. Aldono de la francaj paĝoj konsistigas plian laboron. Absolute nepre necese aldoni plian

empaĝiganton por igi la laboron eltenebla. Nepre komitatanoj en la teamo nome de la komitato. Nun du: Veroniko kaj Fil, sed ne oficiale reprezentantoj de la komitato. Problemo kun Henriko, kiu ne estis oficiale mandatita de la kandidato kaj rolis tamen tiel.

Juliette Ternant: ja estis Henriko reprezentanto de la komitato.

Sergo Sir: eniris en la teamon kiel simpla kontribuanto. Por la estonto ĉio klare dirinda.

Neniu demando.

3.7 Retejo

Raportas **Frederiko Scibor:** kreita antaŭ pluraj jaroj, kaj dokumentoj aldonitaj, sed aldono de informoj sen adaptita strukturo. Bezonataj kamaradoj por strukturi la informojn kaj ebligi al la vizitantoj orientiĝi. 500 vizitantoj ĉiutage. Minimume 2 specoj da vizitantoj: esperantistoj kaj kamaradoj, kiu deziras ricevi informojn, kaj aliaj kiuj malkovras esperanton. Retejo momente ne taŭgas por esperantistoj, kiuj deziras bazajn informojn. Proponoj: malpli da rubrikoj, rubriketo "oftaj demandoj": ses kamaradoj bezonataj por ses mallongaj tekstoj; kio estas Eo? kiu estis Zaza, kiu historio de Eo, kio esta SATAm, eo hodiaŭ. Arĥivo kreenda por malnovaj informoj. Aldonendaj kontaktoj pri la Sago, la komitato, la delegitoj. informoj pri lokaj grupoj kaj kursoj. Ke ĉiu vizitantoj povu trovi informon pri la plej proksima kurso. Nova rubriko kreenda pri la SAGO, kun la kovrilpaĝoj, enhavoj de ĉiuj numeroj, enteno de la malnovaj numeroj. Du aliaj aferoj ne priparolitaj: kreo de asocia informletero reta. Dua afero: retbutiko por la libroj. Priparolenda kun Veroniko kaj Vito.

3.8 Libroservo kaj eldonpolitiko.

Raportas **Veroniko Girard:** pri la eldona flanko, daŭrigos la priparolitajn projektojn pri kiel traduki, la leciono, la racia kurso. Novaĵoj: ĉe la lago en bildstria formato, rakontoj de Tolstoj, libro por infanoj. Eblas starigi skipon por paroli pri eldonprojektoj. Pri la agado en la libroservo: starigo de komputila bilanco, uzebleco per ĉereta datumaro, datumara demando.

Vinko Markovo: kio pri la transportado de la materialo.

Vito Markovo: temo forgesita. Ĉifoje artefarite solvita. Antaŭe kontaktoj kun Choisy, kiu pruntedonis ŝarĝaŭton.

Sergo Sir: pronas aĉeti kamionon por ankaŭ stoki la librojn.

Ansofi Markov: tute serioze priatentinda demando, ĉar rememorigas pri bibliobuso: solvus la problemon de la stoko. Problemo: loki ĝin ie. Ne nepre stulta afero. Tio ŝparus laboron por la transporto de la libro. Solvo serioze pripensinda.

Vito Markovo: pri la luado, tio nuligas komplete la profiton de la librovendado. Pri bibliobuso, eble priatentinda solvo. Ĉu ankaŭ solvo por stokado.

Sergo Sir: alia avantaĝo: uzebla pli ofte kaj pruntebla. Pli ofta prezento tra Francio.

Bernardo Schneider: pri la luado (dufoje necesis): 1000 eŭroj. Veturilo rezervenda preskaŭ tutan semajnon. Ideo pri minibuso teorie bona, sed se pluraj respondeculoj estos

ĥaoso, kaj la veturilo estos tute difektita.

Ansofi Markov: aldonas ideon de Izabela: per ĝi eblus vojaĝi en pluraj lokoj, kaj ankaŭ iri ĝis la SAT-kongresoj. Tamen multaj konkretaj problemoj solvendaj.

3.9 Lokaj grupoj

Raportas **Robin Beto:** rememorigas pri la ekzisto de propagandilo por la unua de majo. Nur ses aŭ sep kunvenantoj. Temis ĉefe pri spertointersanĝo pri loka agado kaj vivo. Miksitaj grupoj kun SAT-Amikoj. Malsimilaj situacioj: foje bonaj interrilatoj inter grupoj, foje malpli. Alia rimarko: pariza grupo konsciis pri la problemoj kaj ne la aliaj. Nepre informcirculado stariĝu. Delegita reto estas unu el la ebloj. Kandidatiĝoj ege bonvenaj.

Guy Martin: demando pri la pariza grupo. Ĉu propono pri kreo de miksaĵaj grupoj.

Robin Beto: en pariza grupo nur SAT-Amikoj.

Guy Martin: kio pri Vendeo?

Robin Beto: ne scias.

Guy Martin: ĉu grupetoj de SAT-amikaro?

Robin Beto: por ke grupoj ekzistu, endas ke la loka vivo kresku. Adresaro kaj delegitoj.

Guy Martin: pasintan jaron.

Vinko Markovo: la starigo de delegitoreto celas ĉefe strukturi tion, kio ekzistas, pliefikigi la transdonon de informoj, kaj krei bezonatajn rimedojn por agado.

Henriko Graven: faris mapon pri esperantistaj grupoj, sed malfacile trovas ilin.

Petro Levi: temo tiel grava, ke ne traktebla en kelkaj minutoj dum kongreso. Multaj aspektoj kaj taskoj. La grupoj ne nur reprezentas SAT-Amikaron sed havas lokan enplantiĝon kaj povas rilati kun la lokaj instancoj. Ankaŭ povas funkcii kiel SAT-rondoj. Pri la formo, ĝi ne povas esti detale fiksita. Ĉio dependas de la lokoj. Iu tre aktiva povas ekfunkciigi grupon en kelkaj monatoj. Io aparte grava: divido inter por- kaj peresperanteco. Lokaj grupoj povas fari la diversajn taskojn.

Hugette Ménard: nur ideo; eble povas peti helpon de Hispania regiono, tute apud la landlimo. Helpo, tamen ne de francoj. ICEM-renkontiĝo ĉe la landlimoj. Paŭo bone lokita tute apud la landlimo. Kontakto kun aliaj regionoj. Same en la regiono de Montauban.

Robin Beto: loka agado kaj organiziĝo nepre necesa por bona informintersanĝo.

Guy Martin: proponas fini la du raporton.

3.10 Kursoj kaj pedagogio.

Sergo Sir: nenio dirinda. Kunveno nekontentige disvolviĝis.

Ansofi Markov; bedaŭras, ke ne interesa raporto, ĉar ne povis partopreni. En alia momento, pri libroservo kaj eldonpolitiko, parolis kun Izabela pri la junulkurso. Pensis pri materialo bezonata en la kursoj. Pri junulkurso, uzas tiun metodon kaj faris diapozitivojn, kiuj estis kolorigitaj. Proponis kopion de la stoko, kiu povus estis enretigita kaj disponigita al la kursgvidantoj.

Izabela Martinez: precipe por vendi junulkursojn.

Huguette Ménard: aprobas tiun aferon, ĉar prezento de la junulkurso pli facila por la infanoj. Ricevis ludojn de alilandanoj. Venontan jaron pretas tion prezenti. Ne ŝatas zorgi pri grupoj por plenkreskuloj sed povas helpi por infanoj.

Bernardo Schneider: junulkurso baldaŭ elĉerpiĝos, decidite ne reeldoni ĝin. Iom kaduka ĉar farita de Petro Louis antaŭ jardekoj. stilo ne modifebla, sed prefere refarebla. Antaŭ kelkaj monatoj aperis "méthode directe" eldonita en Slovakio. Povus respondi al la demandoj de multaj kursgvidantoj.

Sergo Sir: pli entuziasmas refari la junulkurson, kie la etoso ne estas tre SAT-eca.

Gaby Tréanton: bedaŭras la bilancon de Sergo. En tiu grupo estis la plej multaj. Pri junulkurso, tre ŝatata de la lernantoj, do refarenda.

Guy Martin: ankaŭ estis en la grupo. Neniu solvo, sed multaj interŝanĝoj. Por lerni esperanto, pli bone uzi la lingvon ol kursi. Dum unu horo ne eblis ĉion trakti.

Sergo Sir: nun homoj lernas pli kaj pli pere de reto. Pli kaj pli utile havi rondon por praktiki la lingvon.

3.11 Service de Presse

Vinko Markovo: ĉeestis nur Vito kaj Frederiko, do la kunveno ne okazis. Grava temo tamen.

Ansofi Markov: propra reago: tro grava kaj peza afero por nun pritrakti. Timas, ke multaj aliaj same pensis, kaj ne sendis sin kapablaj anstataŭi Henrikon. Eble necesas antaŭvidi tute alian funkciadon, ĉar ne estas normale surŝultrigi ĉion sur nur unu homo. Afero ne solvebla tuj ĉar la ŝoko estas iom granda. Proponoj venos pli poste.

Sergo Sir: problemo, ke Henriko kutimigis ĉiujn ripoziĝi sur liaj ŝultroj. Sama problemo por la SAGO. ial nepre devas esti teama funkciado. Neniam ricevas helpopropojn por la SAGO.

Veroniko Girard: pri SP, eblos traduki artikolojn kiuj kuŝas aliloke. Ĉu eblus fari liston facile atingebla?

Vinko Markovo: ordopropo: plu debati ĉi-posttagmeze.

Guy Martin: ĉu daŭrigi la debaton, ĉu prelegoj. Antaŭ tagmanĝo, proponas danki la OKK-anojn, legante la nomojn. Persone tre ŝatas la manĝaĵojn.

Ĉapitro 4

Kvara laborkunsido

Prezidas Robin Beto

Robin Beto: Antaŭvidita en la programo du prelegoj sed la aferoj evoluis. Eblas daŭrigi la diversajn laborojn kaj demandojn starigitaj dum la laborkunsidoj. Eble ankaŭ iu emas preni tempeton por prezenti ion specialan.

Demando: ĉu okazos prelegoj?

Vinko Markovo: eblaj prelegantoj.

Ĝenerala konsento pri la neceso dispartigi la laboron.

Ansofi Markov: nun laŭ la programo estas privatigo de la edukejoj.

Jeanik Marolleau: kiu estis la prelegantoj?

Vinko Markovo: Alekĉjo, poste Sergo.

Jeanik Marolleau: Pri la dua temo?

Vinko Markovo: same, reklarigas.

4.1 Privatigo de edukejoj

Ansofi Markov: enkondukas pri privatigo de la ekukejoj. Nun varigo de ĉiuj servoj, interalie la nacia edukejo. Traktato de Lisbono akceptata de la franca senato. Homoj rimarkis nenion ĝis kiam la traktato estis akceptita de la senato. Devas malaperi kvinonon de 88 000 antaŭ la fino de la jaro. Jam ni komencis redukti sufiĉe senteble la nombron. Nun protestoj de lernantoj. Du semajnojn antaŭ la libertempo, la lernantoj blokis kelkajn lernejojn, instruistoj strikis kaj gepatroj manifestaciis subtene al la lernantoj. En la instruoj oni konscias pri la afero, sed la amasmedio tute prisilentas la aferon. Jen la situacio. Ĉu demandoj? Iom post iom, propono de minimuma instruado kaj kvalitemuloj devas turni sin al privataj lernejoj. Situacioj pli kaj pli malsekuraj por la instruistoj. Ĉi tie ĉeestis kamaradino kiu havas studnivelon por instrui, sed ankaŭ vivas malfacile kun minacoj pri la situacio.

Sergo Sir: nur konfirmas.

Ansofi Markov: terura situacio, homoj provas batali. En propra lernejo, en la urbe Montinjo apud Parizo, homoj tradicie dekstruloj ne reageme, sed ĉifoje reagis. Pacema movado. Ne konsilo al striko, ĉar konscio pri monperdo por la instruistoj. Kuna manifestacio de instruantoj kaj lernantoj. Preskaŭa unuanimeco kun la protestado. Demandoj

pri la agadmaniero.

Vinko Markovo: aldonas klarigojn pri la superaj instruejoj.

Ansofi Markov: pri ĉio kio ne estas rekta instruado, forigo el la nacia edukado. Iom post iom redukto de la nombro de instruistoj. Multaj nun rekte dungataj de la lernejestroj, kiuj havas pli kaj pli da povo. Tendenco normigi la taskojn. Transformoj jam de pluraj jaroj, sufiĉe diskrete. Rezulto estas, ke ne eblas prizorgi la lernantojn, kiuj estas en pli kaj pli malfacilaj situacioj. Granda nescio pri la maniero batali. Jam tri aŭ kvar manifestacioj en februaro. Estus interese scii, kio okazas aliloke.

Danielle Noulin: iomete lacaj, do ne kuraĝas reagi.

Helène Menissier: ĉu estas ĉi tie anarkistoj aŭ SAT-anoj? Tre ŝatus scii ĉu estas tie anarĥiistoj, kiuj pensas ke la solvo de la problemoj ne estas en la ŝtato. Afero neatentinda de la ŝtato sed de ni mem. Ĉu elpenso de novaj formoj por la edukado?

Sergo Sir: ne estas anarĥiisto, sufiĉe proksima de tiu maniero. Tamen granda danĝero en tiu maniero. Ĉiuj gepatroj pensas, ke pro anarĥiismo ili kapablas instrui la infanojn. Ĉiu rajtas esti gepatroj, kaj estas pli malfacile esti instruantoj.

Ansofi Markov: 34a jaro de instruado, do vidis iun evoluon. Ĉe la komenco ĵetita en unu klaso, ne ricevis klarigojn pri la maniero instrui. Povis tion fari laŭ propraj konvinkoj. Nun kiam maljuniĝinta kaj spertinta, ricevas kritikojn. Bona maniero instrui; havi lernantoj kiuj scios sufiĉe sed ne tro, ekspluateblaj. Ne rekte dirita, sed laŭ la funkciad-maniero, tion oni atingas. Pli kaj pli da taskoj kaj malpli da tempo por prepari la instruado. Taskoj konsiderataj kiel produkto. Kompetenteco klarigita laŭ la nombro kaj kvalito de la taskoj. Instruistoj kontentigu la publikon, kaj la gepatroj ne protestu. Ne klare- sentebla por ĉiuj, sed pli kaj pli.

Sergo Sir: ĉefe instruis en tehnikaj branĉoj. Premo de la industrioj tute ne malnova. Sed eble drastigo. Instruimpoŝto: la entreprenoj rajtas decidi, al kiu utilas tiu sumo. Entreprenej ankaŭ havas apartajn lernejojn. Tio de tre longe.

Ansofi Markov: tre malnova afero tamen iras direkte al privatigo de edukejo. En 1985 jam staĝoj pri "lernejoj kaj eŭropo". Privatigo jam tiam anoncita, laŭ la modelo de germanaj kaj anglaj lernejoj. Tiutempe afero nekredita. Staĝo direktita al ĉefoj kaj volontuloj. Ne ĉesis labori en tiu senco. Nun privatigo kompleta ebla en du aŭ tri jaroj. Protestoj antaŭviditaj, konsiderataj kiel "pedagogiaj eraroj".

Sergo Sir: certas, ke neniam privatigo kompleta, ĉar ne interesa por la kapitalistoj. La parto kiu ne produktas monon restos sub ŝtata prizorgado. En iu regiono, partoprenis en staĝoj por iĝi kudristinoj. En la regiono estis neniuj entreprenoj por kudristinoj sed la edukado por kudristinoj tre similas tion necesan por luti elektronikaĵojn. Tiel povis dungi kapablulojn sen diplomoj, kaj pagi ilin kiel sendiplomitoj. Tio ne eblus se la kudrolernejo estus ilia. Pagi ŝtatan lernejon estis bona rimedo por kaŝi la friponaĵon.

Ansofi Markov: nur konfirmas la diraĵojn de Sergio. Al la ŝtato restos la elementa edukaro. Tio, kio estos atendita de ĉiuj lernantoj estos lasita al la ŝtato. Tio ebligos pli-grandigi la diferencon inter la sociaj niveloj de la lernantoj. Monhavantoj povos kompletigi per privataj kursoj.

Robin Beto; antaŭ kelkaj monatoj, kiam mi estis laboranta mi aŭdis ege interesan radioelsendon... Fakte la celo de la edukadsistemo estas fari civitanojn, kiuj obeas leĝon, ĉu ne?

4.2 Rolo de edukejoj en batalo kontraŭ forpelo de enmigrintoj sen legitimiloj

Robin Beto: Transiras al debato kontraŭ forpelado de enmigrintoj.

Vinko Markovo: Mi komencos per kelkaj vortoj por klarigi, kial ni proponis prelegon pri ĉi tiu temo. Tio estas ĉar, foliumante la kolekton de bultenoj de SAT-Amikaro, mi konstatis, ke, ekzemple en 1968, estis en la buleteno preskaŭ nenio pri la eventoj, kaj estis ankaŭ tre malmulte pri la vietnama milito... Mi ankaŭ konstatis, ke antaŭ kelkaj tempoj oni festis, intercitile, la 70 jaroj de la fino de la hispana intercivilitana milito. Do mi havis la okazon foliumi la SAT gazetojn el ĉi tiu tempo, kaj je mia granda miro, kaj mi eĉ diru honto, mi konstatis, ke la tiamaj diskutoj pri la temoj estis sufiĉe malgrandaj. Eĉ estis kongresoj kie oni timis trakti la temon, opiniante, ke tio levos debatojn, kaj ke nepre oni ne debatitu, ĉar ne devas disputi, ĉu? Kaj ŝajnis tiutempe, ke ne eblas debati sen disputi. Kaj plej ŝoke, laŭ mi, estas ke sub la preteksto ke tiuj aferoj koncernis nur Hispanion, kaj ke la respublikanoj batalis por la hispana ŝtato, oni diris "nu, bone, tio estas naciisma batalo, tio ne koncernas nin. Kaj estis gravaj disputoj pri sendo de mono, sendo de armiloj, aŭ alimaniere helpo. Dum se oni foliumas la tiamajn gazetojn en Esperanto de tiaj batalantoj, oni konstatas, ke kion ili diris, estas ke, de la francoj aŭ germanoj nederlandanoj, ktp., ili ne atendis sendon de armiloj, de batalantoj, de monon, eĉ de flegistoj. Ili nur ŝatus, ekzemple, ke la aliaj landoj, la tieaj laboristoj mobiliziĝu kaj ekstriku kontraŭ la liverado de armiloj al la flanko de Franko. Ĉar tiu tempe Francio estis teorie neŭtrala,. Kaj kio praktike okazis estis, ke, je la nomo de neŭtraleco, oni rifuzis komerci kun la respublikanoj, kiu tamen havis la oro-rezervon en Madrido komence, do kiuj kapablis pagi. Kaj dum la armeoj de la puĉista registaro de Franko, kiu do estis puĉistoj, krome ne havis la monon, kaj krome estis subtenata de Hitlero kaj Musolini, do malgraŭ ĉi tiuj aferoj, la franca registaro de Blum kaj kompanio komercis, liveris armilojn, ktp. al la frankista flanko. Do tiuj, kiuj nepre deziris konservi la manojn purajn, ĉar uzi pafilojn malpurigas la manojn, povis konservi la manojn purajn, kaj tamen tre aktive agadi helpe al la respublikanoj. Kion ili faris foje individue, sed ne je asocia nivelo kaj ne en la asocia nomo. Kaj tio okazis en diversaj momentoj de la historio. Kaj do ĉiufoje mi konstatas, ke kelkaj kamaradoj implikiĝas en la afero, sed la asocio mem ne vere aperas. Kaj tiam venas la demando, do ni estas tamen ne neŭtrala asocio, kia estu nia sinteno flanke al la skandalaĵoj de nia tempo, kaj kion ni faru por ke, post 80 jaroj, ne opiniu nin kretenoj ekster la reala mondo kiam ili vidos pri kio ni parolis en nia revuo.

Do nun konkrete, mi faras tian ekstreman komparon, ĉar nuntempe, en la dolĉa Francio, lando de la homaj rajtoj, estas registaro, kiu decidis forpeli eksterlande 25000 homojn ĉiujare, kaj faras ĉion por atingi tiun ciferon. Kaj ĝi faras tion uzante la plej fiajn rimedojn. Ekzemple en la kvartalo, kie troviĝas la sidejo de SATamikaro, antaŭ proksimume unu monato, okazis kz je la sesa matene la tuta kvartalo estis ĉirkaŭita de policistoj, kiuj perforte rompis ĉiujn pordojn de enmigra hotelo, estis maliaj enmigrintoj. La informiloj de la burĝa gazetaro diris, ke pro higienaj kialoj ili devis fermi la centron. Por tion fari ili rompis pordojn, ili batis homojn, kaj homoj poste troviĝis sen leĝa pravigo en diversaj detenejoj. En Vinceno estas unu el tiuj, pudore nomataj "*centre de rétention*

4.2. ROLO DE EDUKEJOJ EN BATALO KONTRAŬ FORPELO DE ENMIGRANTOJ SEN LEGITIMILOJ ĈAPITRO 4. KVARA LABORKUNSIDO

administrative” (administra detenejo aŭ koncentrejo), kiuj estas fakte ejoj, kie homoj sen legitimoj estas parkitaj atendante elpelon al eksterlando. Kaj tio estas en kondiĉoj sanaj kaj psikologiaj absolute teruraj. Okazas ribeloj de la tieaj detenitoj, foje okazas provo memmortigo, ktp. Kaj sufiĉe regule oni aŭdas, ke iu aŭ alia falis el la fenestro de la sesa etaĝo provante fiĝi polican kontrolon, ke iu kormalsana estis resendita al sia lando per aviadilo, ktp. Tiuj aferoj oni aŭdas preskaŭ ĉiutage, kaj ŝajnas, ke ĉio glatas en la mondo, nia kara prezidento amindumas kun steletulino, kaj tio estas grava... sed samtempe, homoj mortas tra la fenestro, tio ne estas tre grava nek tre atentinda. Tamen ne ĉiuj restas senreage fronte al tio, estas iuj kiuj organiziĝas. Kaj unu el la lokoj, kie la rezistado kontraŭ tiuj skandalaĵoj organiziĝas estas ĝuste la lernejoj kaj la lerneja medio. Tute simple ĉar ekzistas kelkaj leĝoj, kiuj protektas la infanojn specife, kaj normale la infanoj rajtas studi en la lernejoj, eĉ se ili ne estas laŭleĝe legetimitaj, ktp., kaj ke krome ekzistas teksto, kiu nomiĝas ”Universala deklaro pri homaj rajtoj”, kiu diras, ke pli malpli la familio rajtas vivi kune, kaj ke vi ne povas forpeli la gepatrojn lasante la kvinjaran bubon sola en la lando. Okazas ke pluraj lernejoj, gepatraj asocioj mobiliziĝas sufiĉe regule por malebligi la elpelon de familioj, uzante la, kiel diris la dekstrularo, pretekston ke la infanoj estas en la lernejoj por malebligi la forpelon de la gepatroj kaj de la infanoj. Kaj okazas ankaŭ, ke tiuj rezistoprovoj estas pli kaj pli krimigitaj, kaj ke kiam lernejestroj ribelas kontraŭ la policaĵoj, rifuzas ke la polico eniru en la lernejon ktp. Pli kaj pli ofte ili, pro tio, pasigas kelkajn tagojn en malliberejo. Do la simpla fakto, ke ili malebligas ke oni forpelas homon al alia parto de la lando, kie li verŝajne mortaĉos, iĝas krimo. Tion oni nomas ”krimo pro solidareco”.

Kaj do la dua punkto estas kio estas la rilato inter tio kaj SAT-Amikaro, kaj kion ni povas fari. Ĉu ni ne povus, el asocia vidpunkto, iom organiziĝi por fari iom pli? Unue ĉeesti tiujn manifestaciojn. Kaj tiam leviĝas la demando ĉu oni ĉeestas tie. Povus esti, ke se Esperantistoj estas sufiĉe multnombraj, post iom da tempo ni estos same konataj kiel tiuj grupetoj. Poste la demando estas ĉu homoj tiam eĉ konantaj nin emos lerni Esperanton kaj aliĝi al nia asocio ktp. aŭ ĉu ili konos nin kaj taksos nin ia sekteto kun kiu ili ne emas speciale kunlabori. Kaj dua grava punkto estas ke tie ni rekte frontas la problemoj pri lingvaj baroj, ĉar tiuj enmigrintoj ne nepre bone konas la francan, kaj krome unu el la trikoj por forpeli la homojn estas ĝuste uzi lingvajn antaŭtestojn tre multe kostajn por ebligi al la homoj rajti resti en la lando, fari demandon pri la kulturoj de la lando, ktp. Do la demandoj pri la identeco estas tute kerne ligita al la afero. Kaj la dua estas, ke tio nepre supozigas internaciajn kontaktojn, ĉar estas problemoj pri rilatoj inter malsamaj asocioj kaj malsamaj landoj. Estas problemoj, kiuj okazas ne nur en Francio, sed ankaŭ en aliaj landoj. Krome, momente, do ekzemple an SAT, ni havas kamaradon Jakvo Schram en Antverpeno, kiu pasigas la grandan plimulton de sia tempo laborante en ejo, kie li instruas la nederlandan al enmigrintoj, do li havas kontaktojn kun tiu ĉi medio, sed kiam ni parolis pri la temo enmigrintoj dum la pasinta SATkongreso, sed ni tamen ne transiris al pli organiza paŝo, dum estas unu el la tereno sur kiu ni povus iom pli antaŭeniri. Krome en Koreio, ni ankaŭ havas sufiĉe viglan kernon da kamaradoj, kiuj ankaŭ partoprenas en manifestacioj por la rajtoj de la senlegitimaj laboristoj ktp. Tio signifas ke en almenaŭ tri lokoj en la mondo, kaj eble eĉ en pli, estas Esperantistaj

kamaradoj, kiuj interesiĝas pri la temo. Estas unuope, individue engaĝitaj en la afero, sed ni ne transiris plian paŝon de organiziteco. Kaj pro la fakto, ke en la nuna mondo ĉiuj estas okupitaj de amaso da aferoj, okazas ke kiam ni aliras iun surstrate kaj parolas pri Esperanto, kiam li ne konsideras la aferon frenezaĵo, li diras nu, bone, interesa ideo, bela projekto, sed tempon mi ne havas. Kaj eĉ pluraj kamaradoj ĉi tie diras nu, bone, karaj, dankon por ĉio farita, nepre daŭrigu, ktp., sed provizore ne kalkulu pri mi, mi estas tro engaĝita en la ĉiutagaĵoj. Tio estas ĝenerala problemo en la nuna mondo, kie oni kreskigas ĉian rimedon kaj ĉian ekspluatadkondiĉojn. Tio signifas, ke, pli ol iam ajn antaŭ, estas nepre necese proponi al la homoj Esperanton en maniero kie ili povos utiligi ĝin tuj, konkrete kaj praktike efike, por ke ili sentu la bezonon kaj la emon lerni ĝin, ekuzi ĝin.

Izabela Martinez: Pri la lingvoj, Esperanto povas esti instruada al tiuj multlingvaj homoj. Jam en Liono ili faras tion, la Kotopo faras tion. Estas multe da malsamaj naciuloj, kaj ili organizas plurajn kursojn en pluraj lingvoj kaj Esperante, por ke jam ii sin sentu malpli solaj, ĉar ili povos interkompreniĝi per Esperanto.

Robin Beto: Miaflanke mi havis jenan sperton, mi proonis al loka kamaradino, kiu volontule laboras en "foyer", en loĝejo kie loĝas enmigrintoj. Mi proponas al ŝi, eble tiuj homoj ŝatus interkompreniĝi. Kaj fakte ŝi respondis al mi "mi proponos Esperanto-kurson". Fakte la respondo venis, kaj tute ne surprizis, ke ili preferas pasigi tempon lerni la francan, ĉar tutposte ili ricevos legitimilon, eble.

Izabela Martinez: Ankaŭ instrui al ili la francan lingvon, povas esti, ke tiu tasko estas farata de Esperantistoj francaj. Ke ili sin komprenu inter si, kaj kompreneble la ĉefa afero estas, ke ili lernu la francan. Estus ankaŭ bona ideo, se estus Esperantistoj, kiuj povos instrui al ili la francan lingvon.

Robin Beto: Por daŭrigi pri mia sperto, en tiu loko estas jam sufiĉe da franclingvaj kursoj. Kaj restas scii kiu estas tiu oni.

Vinko Markovo: Do fakte la rimarko de Isabelle levas laŭ mi sufiĉe gravan demandon. Se montriĝas ke la nura maniero oportune helpi al tiaj homoj estas instrui la francan, tio signifas, ke ni agnoskas la fakton ke Esperanto en tio ĉi tute ne utilas.

Izabela Martinez: Ne Esperanto, sed estas la alporto de Esperantistoj.

Vinko Markovo: Kompreneble, sed ĉu necesas tiam lerni Esperanton, por instrui, en la franca al enmigrintoj. Laŭ mi, en tiu kazo, la fakto ke vi estas Esperantisto kaj instruas la francan povas okazi, kaj ekzisti, sed tio ne povas esti en si mem instigilo por lerni Esperanton kaj funkciigi laboristan Esperanto asocion.

La problemo estas ĝuste, ke se laboristoj Esperantistoj povas helpi al la laborista mondo nur alimaniere ol per Esperanto, tio signifas fakte, ke Esperanto en si mem ne montriĝas taŭga ilo por ili. Kaj se Esperanto ne montriĝas taŭga ilo por laboristaj celoj, ni povas findemandi, kial laboristoj, krom hobiisme, lernu Esperanton. Kaj tiel ili starigus apartan Esperanto asocion.

Etel: Tio surface ŝajnas ege homeca strebo helpi enmigradon, sed finfine, mi ne opinias tion tiom saĝa. Ĉar kial homoj estas motivigitaj foriri el siaj landoj? Ĉar io mankas al ili en tiuj landoj, kie ili naskiĝis. Mi opinias pli indan celon nuligi tiun maljustecon, kiu kaŭzas ke homoj volas foriri el siaj naskiĝlandoj al alia lando, kies eĉ lingvon ili ne konas serĉante tiun ŝelon de pano, ni diru. Laŭ mi tio estas globala maljusteco pli inda por iu

lukto, ol helpi personojn, ke ili restu sen legitimiloj, tute ne leĝe. Kiel ili farus, se ili ne havas tiun restadpermeson? Ili nepre devas esti krimuloj por travivi, aŭ se inoj, fariĝas prostituinoj, ktp. Do tial mi ne opinias, ke helpo al migrado estas tiom homeca, kiel ŝajnas. Tion mi pensas pli inda, ke oni strebu al tiuj ĉefaj instancoj sur monda politika scenejo, kiuj havas influon por nuligi malsaton en mondo, por nuligi tiujn elementojn, kiuj motivigas personojn veni al bela Eŭropo, kaj por lasi aĉan Afrikon, aĉegan Azion, teruran Sudameriko, ktp.

Vinko Markovo: La rimarko de Etel ŝajnas al mi tre interesa kaj tre pensiga, ĉar oni devas konscii, ke ebligo al homoj restadi en Francio en si mem ne povas esti absoluta celo, ĉar interalie la fakto ke ili estas senlegitimiloj ebligas ekspluati ilin. Kaj pro tio verŝajne oni venigas ilin. Ĉar homoj sen protektado ia ajna estas pli facile ekspluateblaj. Se ili ne havas leĝan ekziston, ili estas pli facile ekspluateblaj, kaj efektive en la kazo de la prostituitinoj, tio estas tute klara, pro la fakto ke ili ne havas legitimilon, la policistoj povas permesi el si absolute ĉion, kion ili deziras super ili.

Vinko Markovo: La nura fakto, ke oni ebligas al la homoj resti en Francio, en si mem, ne povas esti absoluta alstrebinda celo. Kaj mi absolute konsentas ankaŭ, ke je longa nivelo kaj je pli vasta vidpunkto, la ĝusta maniero estus, ke homoj havu decajn vivkondiĉojn ĉie en la mondo. Tio supozigas, ke la riĉaj landoj devus ĉesi priŝteli la malriĉajn, ĉesi tie disvendi armilojn, ktp. Tio levas multe pli gravajn demandojn, kaj pli malpli fine oni alvenas al la grava ideo, ke necesas provoki tutmondan proletan revolucion por solvi la problemon je monda skalo.

La dua afero estas ke, konkrete en la ĉiutaga vivo, plejmultaj homoj emas solvi siajn tujajn problemojn. Kaj do kiam vi estas enmigrinto, kaj kiam vi fakte troviĝas en Francio, vi emas plu povi vivi tie, do ĉu akirante legitimilon por esti malpli ekspluatata, ĉu restante kun viaj familianoj, amikoj, ktp. Kaj pro tio multaj politikaj amasmovadoj interesiĝas pri la temo, pro tio ke tio estas unu el la ĉefaj problemoj spertataj de la homoj, se ili vidas, ke iuj helpas al ili, poste ili diras "bone, tiuj anarkiistoj helpis min en tiu afero, do tio signifas, ke anarkiismo eble estas io alia ol bombo ĵetado, kaj eble tio havas ankaŭ aliajn interesajn aspektojn." Kaj estas same por iu alia movado. Mi supozas, ke tio estas unu el la kialoj, kiu puŝas la diversajn sociajn movadojn implikiĝi en la afero. Kaj ili sukcesas, ĉar praktike ii montriĝas utiaj en kelkaj aferoj. Mi supozas, ke la plej multo de komunistoj ne aliĝas al komunista partio pro admiro al Stalino aŭ al Sovetio, ktp., sed ĉar konkrete en la laborejo, kie ili troviĝas, estas kelkaj komunistoj, kiuj montriĝas efikaj homoj por ebligi al ili ne maldungiĝi. En aliaj medioj, la anarkiistoj plenumas la saman rolon. Kaj la verduloj, ktp., ktp. Kaj tio estas unu el la kialoj de la relativa sukceso de tiuj movadoj, malgraŭ la kalumnioj, kiujn ili ĉiuj spertas, samnivele kiel la Esperantistoj. Kaj pro tio, mi emas pensi, ke por ke utiligo de Esperanto al laboristoj estu ne nur slogano sed io reala, oni devus cerbumi kiamaniere praktike proponi ion al la homoj.

Ĉapitro 5

Dankoj

SAT-Amikaro dankas al SAT kaj Maksimiliano Gverino por prunto de la registriloj, al la verkintoj de \LaTeX / \LaTeX por disponigo de libera enpaĝig-programo, kaj al Bob Cordeau pro klarigoj pri ĝia funkciado. Dankotaj ankaŭ estos tiuj kamaradoj, kiuj rimarkigos erarojn en la ĉi-supra protokolo. Ĉar temas pri elektronika eldono, eblas tre facile ĝisdatigi ĝin.